


EL POPOLA ĈINIO

中國報道



6

1982

Vilaĝo de Jaŭ-oj

Fotoj de CAI HAIFENG kaj ZHU XIANMIN

Jaŭ-nacieco kun pli ol 1.2 milionoj da membroj havas longan historion. Ili loĝas en pli ol 130 gubernioj de la provincoj Hunan, Yunnan, Guangdong, Guizhou kaj Jiangxi kaj la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, ĉefe en la lasta. Ili havas siajn lingvon kaj originalajn morojn kaj kutimojn. Ili okupiĝas pri agrikulturo, forstumado kaj metioj. Ili loĝas en ortangulaj duetaĝaj domoj el bambuo kaj ligno aŭ sole el ligno. En la supra etaĝo estas balkono sen balustrado por mastrumaj laboroj de virinoj junaj kaj maljunaj. Pro sia granda dissemiteco la jaŭ-oj portas malsamajn kapvestojn. Iuj ŝatas bunte broditan ĉapon, aliaj ĉapon kun arĝentaj ornamoj kaj triaj nigran kaptukon kun broditaj borderaĵoj. La jaŭ-aj virinoj estas lertaj en teksado, tinkurado kaj brodado kaj povas brodi belajn vestojn kaj ornamojn. La jaŭ-oj havas riĉan folkloron. Ili amas kanti. Je ĉiu festa vespero ili bruligas kampfajron apud vilaĝo. Ĉiuj vilaĝanoj junaj kaj maljunaj kantas sidante ĉirkaŭ la fajro, kaj gejunuloj ofte fariĝas geamantoj en tiu aktivado.




Parto de jaŭ-a vilaĝo



Sur la vojo al foiro



Paŝtado en mateno



En la supra etaĝo de ligna domo



Knabinoj esploras brodarton.

Festa kampfajro



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Infano kaj anasidoj
Foto de ZHENG YUNFENG

SUR LA DORSKOVRILO:

Knabineto (Ĉinstila pentraĵo)
de JIANG TIEFENG

La aŭtoro aplikis ĉinan delikatan kaj intenskoloran teknikon por pentri knabineton inter floroj. La pentraĵo simbolas, ke sane kreskas la infanoj de la nova Ĉinio kvazaŭ belaj floroj. Ĝi estas profundsingnifa, brilkolora, vivoplena kaj abunda je ornama efekto.

KOLORAJ SERIOJ:

Vilaĝo de jaŭ-oj
Pejzaĝoj de Gushan-monto en Fujian-provinco
Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj
Strata vinfesto en malnova mezepoka urbo en FR Germanio
La Konstanca Lago en FR Germanio
Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (3): La antikva urbo Luoyang
La templo Yonghegong

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La socialisma spirita civilizacio en konstruado
Ami sciencon ekde la infaneco
Ĉinaj Esp-istoj: Kantistino Qiu Zimin

Enhavo

Ŝanĝiĝoj de Kaixiangong	2
Vojaĝo tra la Meza Baseno de la Flava Rivero (3): La antikva urbo Luoyang	7
NIA KULTIVEJO: Kio estas Esperanto kaj kia estos ĝ'a estonteco?	10
Martha Root — ambasadorino de mondpaco pere de Esperanto	14
SUR NIA LIBROBRETO: Nova lernilo por progresantoj	15
ESP-NOVAĴOJ	17
VIDINDAJ LOKOJ: Gushan-monto	23
Malgrandaj bestomaniuloj	20
Firma knabino	25
Jiang Zhaohe — majstro-tuĉpentristo de Ĉinio	28
La pomo (novelo)	30
MIA VIVO: Kiel mi servas al eksterlandaj gastoj	33
5000 JAROJ DE ĈINIO: La periodo de Militantaj Regnoj	36
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Lamaisma templo Yonghegong en Pekino	40
Goethe kaj Ĉinio	42
Bakin ricevis "Internacian Premion Dante Alighieri"	43
George Enescu	44
AMIKECO	22,41
KALEJDOSKOPO: Koko kun blanka plumaro kaj nigraj ostoj; Hidno; Ruĝa sako-karpo	32
KURANTAJ AFEROJ	16
KORESPONDI DEZIRAS	46

JARABONTARIFO	FR Germanio	DM	10.80	Italio	Lit.	5280	Nov-Zelando	NZ\$	6.70		
Aŭstralio	\$A	5.70	Britio	£	3.00	Japanio	Yen	1400	Svisio	SF	10.50
Aŭstrio	Sch	81.60	Finnlando	FMK	24.00	Jugoslavio	Din.	150	Usono	US\$	6.00
Belgio	BF	180.00	Francio	FF	26.40	Nederlando	Gld.	12.60	Kanado	Can.\$	7.20
Por aliaj landoj en Afriko, Azio kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30											



FEI XIAOTONG:

ŜANGÎĜO DE KAIXIANGONG

Profesoro Fei Xiaotong faras prelegon "Ŝanĝigo de Kaixiangong" en Londono.

La aŭtoro estas fama ĉina soci-antropologo, estro de la Sociologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicedestro de la Instituto pri Nacimalklimultoj kaj profesoro de la Centra Nacimalklimulta Instituto. Li estis honorita per Huxley-medalo de la Reĝa Antropologia Instituto de Britio en Londono la 18-an de novembro 1981. La medalo, fondita en 1900 por memori Thomas H. Huxley, brita naturesploristo kaj aŭtoro de la fama verko "La Evoluo kaj Aliaj Traktaĵoj", estas la plej alta honora premio en la internacia antropologia rondo. Fei estas la unua ĉino ricevinta tiun honoron.

Fei studis en la Londona Ekonomika Lernejo de 1936 ĝis 1938 kaj doktoriĝis per sia disertaĵo "La Kamparana Vivo en Ĉinio", kiu estis publikigita en Britio en 1938 kaj poste kvarfoje reeldonita. Oni rigardas ĝin kiel klasikan verkon en tiu sfero. La disertaĵo estas bazita sur lia scienca esploro pri la vilaĝo Kaixiangong, proksima al lia hejmloko. Li revizitis Kaixiangong en 1957 kaj 1981. Ĝuste kiel li diras, pere de tiu vilaĝo oni povas rimarki la ŝanĝigon de la ĉina kamparo dum duonjarcento. La jena artikolo estas eltirita el lia parolado ĉe la medal-prezenta ceremonio.

LA RED.

Kaixiangong, proksima al mia naskiĝloko Wujiang-gubernio, Jiangsu-provinco, estas vilaĝo, kiun mi esploris en 1936. Oktobre de 1981 mi triafoje vizitis ĝin.

Bordanta Taihu-lagon inter la urboj Suzhou kaj Hangzhou, la vilaĝo Kaixiangong troviĝas en riĉa regiono de Ĉinio. Tie la grundo estas fekunda, akvo abunda kaj agrikultura produk-

tokvanto alta. Krome tie rapide disvolviĝas la flankokupoj kaj metiindustrio, kies ĉefaj materialoj estas agrikulturaj produktaĵoj. Laŭ statistiko pri 700 000 produktaj brigadoj en 1979, la

jara pokapa meznombra enspezo estis malpli ol 100 juanoj, dum en la regiono de Suzhou, kie sin trovas Kaixiangong, ĝi superis 250 juanojn en 1980. El tio oni klare vidas la ekonomian superecon de tiu regiono. La jara pokapa enspezo de Kaixiangong estas proksimume 300 juanoj, iom pli multe ol la meznombra enspezo de la koncerna regiono. Analizante tiun vilaĝon kaj komparante ĝin kun vilaĝoj pli riĉaj kaj malpli riĉaj, ni rimarkos la ŝanĝigon de la kampara ekonomio de Ĉinio kaj la ĝustan vojon al riĉiĝo.

EKONOMIO TRA DUONJARCENTO

En la lasta duonjarcento la vilaĝo Kaixiangong sekvis saman vojon kiel aliaj vilaĝoj de Ĉinio, tamen ĝi havas siajn proprajn trajtojn. Post mia esploro en 1936 mi trovis, ke la ĉefa problemo frontata de la ĉinaj kamparanoj estas la malsato. Ilia vivo fariĝis ankoraŭ pli mizera dum 1936-1949. En tiu periodo la bienuloj posedis 56.5% de la agroj en Kaixiangong, kaj 75% de la kamparanaĵoj vivis de farmitaj terpecoj kaj mono pruntita ĉe uzuristoj. La grena produktokvanto malleviĝis jaron post jaro. La hektara produktokvanto de rizo estis nur 2 250 kg. La bredado de silkraŭpoj preskaŭ stagnis. Krom tio, tie furiozis naturaj katastrofoj kaj diversaj impostoj, kaj tiranis rabistoj kaj ŝtelistoj. Ĉio ĉi dronigis la popolanon en ekstrema mizero. La plej grava kaŭzo de la mizero, kiel mi diris en la disertaĵo "Kamparana Vivo en Ĉinio", estis la agrara sistemo kaj la politika povo, kiu protektis tiun sistemon. La Liberiĝo en 1949 ŝanĝis la karakteron de la ĉina politika povo kaj la agrara re-

formo en 1951 likvidis la privatan posedon de agroj, ekde tiam la kamparanoj fariĝis mastroj de la tero. Ĉinio eniris en novan historian periodon.

Post la agrara reformo kamparanoj laboris sur la propra parcelo kun senprecedence alta entuziasmo. En 1952, kiam plenumiĝis la agrara reformo, la totala grena produktokvanto de la lando pliiĝis je 42.8% kompare kun tiu en 1949, kiam fondiĝis la popola respubliko. Dume la aĉetpovo de la kamparanoj duobliĝis. Vidu la vilaĝon Kaixiangong. Ĝia hektara produktokvanto de greno estis 3 750 kg. en 1952, t.e. je 66% pli multe ol tiu en 1936. En 1956, t.e. en la unua jaro post la plenumiĝo de la agrikultura kooperigo, la hektara produktokvanto atingis 5 367 kg., t.e. je 28% pli multe ol tiu en 1955 kaj je 42% pli multe ol tiu en 1952.

Same kiel en multaj aliaj vilaĝoj de Ĉinio, ankaŭ en Kaixiangong fondiĝis popola komunumo en 1958, kio estis tro frua laŭ la nuna vidpunkto. Tiam oni elmetis tro altajn produktajn kvotojn, kio damaĝis la laborentuziasmon de komunumanoj. Rezulte, reduktiĝis kaj la grena produktokvanto kaj la enspezo de la komunumanoj. En 1960 estiĝis iuj aliaj malfaciloj, kaj la tuta lando ekdronis en malfacila periodo. Ankaŭ en la vilaĝo Kaixiangong aperis elmigrado de kamparanoj. En 1962 oni korektis iujn maldekstrajn tendencojn kaj difinis la produktan taĉmenton kiel la bazan kalkulan unuon kaj ekpraktikis la regulon "pagi laŭ laborkvanto". Dume oni ankaŭ ebenigis kampojn, fosis kanalojn, drenis kaj irigaciis kampojn per elektraj maŝinoj, tiel ke neniĝis la primitiva irigacia sistemo. En la periodo

de 1962 ĝis 1966 la grena produktokvanto de la vilaĝo ĉiujare pliiĝis je 8.25%. Samtempe oni reenkondukis kaj disvolvis la bredadon de silkraŭpoj, kio rezultigis, ke la pokapa enspezo atingis 119 juanojn en 1966. La komunumanoj hodiaŭ ankoraŭ rigardas la jaron 1962 kiel turnopunkton por riĉiĝi.

Dum la dek jaroj ekde la somero de 1966 en la tuta lando regis ĥaoso, kaj kvankam la kamparo ne suferis tiel gravan damaĝon kiel la urboj, tamen la troa emfazo "preni grenon kiel ĉefĉeneron" katenis la disvolviĝon de la flankokupoj kolektivaj kaj familiaj. Krom tio, la troa emfazo de unuigo de komando en administrado sen distingo inter la diferencoj en la malsamaj regionoj kaj praktikado de egalismo en la distribuado refoje stagnigis la kamparan ekonomion. En la vilaĝo Kaixiangong dum la 12 jaroj (1966-1978) la totala grena produktokvanto de la vilaĝo leviĝis meznombro nur 3.95% jare kaj la jara pokapa enspezo restis ĉ. 114 juanoj pro tio, ke oni emfazis nur grenan produktadon kaj subtaksis industrion, flankokupojn kaj reduktion de la grena produktokosto.

La ĉina kamparo eniris en novan periodon de ekonomia disvolviĝo en la fino de 1978.

RAPIDA KRESKO DE LA NOMBRO DE LOĜANTOJ

Nun mi tuŝu alian problemon influantan la kamparan ekonomion, t.e. la problemo pri la loĝantoj.

Post la Liberiĝo en 1949 la ĉina ekonomio akiris senprecedence rapidan disvolviĝon kaj la popola vivo rimarkindan pliboniĝon, dum la nombro de loĝan-



Fei Xiaotong kaj la 78-jara Zhuang Axiu en Kaixiangong, en oktobro 1981

toj rapide kreskis. En 1917 Ĉinio havis nur 440 milionojn da loĝantoj kaj post 32 jaroj, t.e. en 1949, ĝi nombris 540 milionojn. En la fino de 1980 la nombro de loĝantoj kreskis ĝis 980 milionoj, t.e. 181% kiom tiu en 1949. Diferencega ja estas la loĝ-denseco. Interalie la deltoj de Jangzi-rivero kaj la Perla Rivero estas la plej troloĝata loko en la mondo, kun meze 400-500 homoj en ĉiu kvadrata kilometro.

Kaj ĝuste en la delto de Jangzi-rivero troviĝas Kaixiangong, kie estis 1 458 loĝantoj en 1936 kaj 1 440 en 1956, 1 899 en 1966, t.e. je 459 pli multe ol en 1956. La rapideco de kreskado superis tiun de la tuta lando en meza nombro.

Nun en Kaixiangong loĝas 2 308 homoj, je ĉ. 60% pli multe ol en 1936. La rapideco estas pli malalta ol tiu en aliaj lokoj de Ĉinio.

La tro rapida kresko de la loĝantaro malutilas al la leviĝo de

la popola vivnivelo. La rapida kresko de la agrikultura produktado post la Liberiĝo ne povis kuratingi la rapidan kreskon de la loĝantaro, kio malhelpis la pokapan porciumadon de greno. Ekz. en 1978 la totala grena produktokvanto de Ĉinio estis pli ol

300 miliardoj da kg., je 169.2% pli multe ol tiu en 1949, tamen laŭ la pokapa grena produktokvanto ĝi kreskis nur je 52%. Sed pro la fekunda grundo kaj kompare malrapida kresko de la loĝantaro de Kaixiangong, la stato estas malsama. En 1980 ĉiu vilaĝano ricevis meze 500 kg. da greno (inkl. de grenporcio kaj grena subvencio por la flankaj okupoj), sekve de kio oni havis grenon por bredi porkojn, kokojn k.a., kio ankorau pli levis la familian enspezon de la kamparanoj.

Tamen Ĉinio ne povas facile redukti sian loĝantnombro de miliardo en mallonga periodo. Oni taksas, ke Ĉinio havos 1.2 miliardojn da loĝantoj en la fino de la nuna jarcento. Se la politiko estos ĝusta, la nombro de loĝantoj eble stabiligĝos aŭ reduktiĝos. Nun en Ĉinio ĉ. 800 milionoj da loĝantoj vivas en la kamparo. Ni devas fari planon por soci-ekonomia disvolviĝo surbaze de tiuj faktoj.

Kaixiangong en 1936




NOVA FENOMENO KAJ NOVA PROBLEMO

En 1980 Kaixiangong jam vicigis inter la riĉaj vilaĝoj de la tuta lando. Ĝia jara pokapa enspezo atingis proksimume 300 juanojn, kvankam en 1978 ĉiu vilaĝano enspezis meze nur 114 juanojn. Kio kaŭzis tiel rapidan riĉiĝon en tiuj tri jaroj?

La riĉiĝo de la kamparanoj de Kaixiangong rezultis ĉefe el tio, ke novaj kamparaj ekonomiaj politikoj estas praktikataj ekde 1979. Oni ne plu unuflanke disvolvas la grenan produktadon, sed praktikas la politikon de disvolvo de pluraj specoj de ekonomio kaj plenenergie disvolvas diversspecajn flankokupojn. La silkraŭpa bredado estas jam rigardata kiel parto de la kolektiva ekonomio. Ankaŭ la bredado de ŝafoj kaj kunikloj jam fariĝis nemankigebla okupo kaj grava enspezo por ĉiu familio. Ĉiu membro enspezis meze 120-150 juanojn el la familiaj flankokupoj en 1980, kiu sumo konsistigis 50% de la totala enspezo por tiu jaro. Mi vizitis familion kvin-membran kun kvar laboruloj, kiu enspezis 2 429 juanojn en 1980, t.e. ĉiu membro meze enspezis 485.8 juanojn. Tiujare la familio elspezis 960 juanojn por la ĉiutaga vivo kaj deponis en banko 1 469 juanojn por konstrui novan domon en la estonteco.

Nun la problemoj pri manĝaĵoj kaj vestoj jam ne plu ekzistas. La kamparanoj plej zorgas pri domoj kaj mebloj. Iu vilaĝa kadro diris al mi, ke de 1948 ĝis 1980 en la tuta vilaĝo konstruiĝis malpli ol cent ĉambroj, tiel ke pliiĝis meze nur unu kvadrata metro por ĉiu vilaĝano. Nur en la lastaj jaroj la riĉaj vilaĝanoj in-



Kaixiangong hodiaŭ

teresiĝis pri konstruado de domo. Ofte okazas, ke kamparana familio akumulas mil juanojn en ĉiu jaro, ĉar por konstrui unu ĉambron oni devas elspezi tiom da mono, kaj ĉiu familio devas havi minimume tri ĉambrojn. Riĉiĝinte, la kamparanoj kompreneble deziras novan loĝejon. Sed antaŭ 1978 tio estis neimagebla.

Oni ĝenerale konstruas novajn domojn antaŭ la geedziĝo de siaj gefiloj. Antaŭe, kiam la loĝejo ne sufiĉis, oni estis devigi-

ta prokrasti la ceremonion aŭ apartigi la ĉambron por la novaj geedzoj. Nun la kamparanoj havas monon por konstrui novan domon por siaj baldaŭ edziĝontaj filoj. Pasintjare en la apudriveraj produktaj taĉmentoj kun nur 250 familioj, oni konstruis sume 50 ĉambrojn nove meblitajn. Tie mankas virinoj, pro kio oni dorlotas siajn filinojn. Antaŭ ilia edziniĝo la gepatroj certe preparas por ili ĉiujn necesajn dotojn. Ni taksis, ke ĝenerale la meblaro kaj vestaro de nova fa-

milio valoras pli ol 2 000 juanojn.

Kun la prosperiĝo de la kampara ekonomio aperis multaj novaj problemoj, unu el kiuj estas kiel la kamparanoj uzas la ekstran monon. En la tuta lando ĉiujare kelkdek miliardoj da juanoj cirkulas al la kamparo, sed per kiaj komercaĵoj oni povas kontentigi la bezonon de la kamparanoj? Tial estas necese esplori, kion bezonas la kamparanoj kaj kiel oni devas helpi ilin konvene konsumi. En tio la socialisma laŭplana ekonomio povas montri siajn avantaĝojn.

PERSPEKTIVO DE LA KOLEKTIVA EKONOMIO

Ekde sia apero en 1956 la kolektiva ekonomio restas la ĉefa parto de la kampara ekonomio. De 1958, kiam fondiĝis la popola komunumo en la kamparo, ĝis 1978 estis tre malgranda la individua ekonomio. La kamparanoj de Kaixiangong, same kiel tiuj de aliaj ĉinaj vilaĝoj, enspezis preskaŭ sole de la kolektivo. Antaŭ 1978 la familiaj flankokupoj, kiel la individua ekonomio, estis katenitaj. Nur en 1978 la erara politiko sufoki la laborentuziasmon de kamparanoj estis forigita kaj iliaj familiaj flankokupoj restarigitaj kaj disvolvigitaj, tiel ke la enspezo rimarkeble pliigis.

La karaktero de la kolektiva ekonomio de la agrikulturo de Ĉinio kaj ĝia kampara industrio restas neŝanĝita. Ekde 1981 oni praktikas produktan respondecosistemon pagi laŭ produktokvanto. Oni celas per ĝi perfektigi la administradon kaj praktiki la principon "al ĉiu laŭ lia laboro", surbaze de la kolektiva ekonomio kaj laŭ la nivelo de la produkta tekniko kaj politika

konscio de la popolamasoj. Ĝi ne signifas ŝanĝon de la karaktero de la ekonomia sistemo.

Tamen, se paroli pri la individua flankokupa produktado, oni rimarku, ke ĝi estas nur parto de la procezo de la ekonomia restariĝo de Kaixiangong, ĉar la enspezo de la kamparanoj venas ĉefe el la kolektiva ekonomio de la vilaĝo, kvankam en la lastaj jaroj aperis granda ŝanĝiĝo tiuflanke.

En la kolektiva ekonomio estas tri ĉefaj fontoj de enspezoj: enspezo de partopreno en agrikultura produktado, enspezo de flankokupoj bazitaj sur agrikultura produktado kaj enspezo de kolektiva industrio.

Alia ŝanĝiĝo de la kampara ekonomio speguliĝas en la kolektiva ekonomio mem, kio karakteriziĝas ĉefe per malpliigo de la proporcio de la agrikulturo, iagrada pliigo de tiu de la flankokupoj kaj rapida pliigo de tiu de la industrio.

En la Kontraŭjapana Rezistmilito la kokon-elbobenejo kaj morus-arbaro de la vilaĝo estis detruitaj kaj de tiam la tiea silka industrio dronis en malprospero. Post kiam la kolektiva bredado de silkraŭpoj restariĝis en 1966, la tiea jara pokapa enspezo superis cent juanojn, tamen restis granda malekvilibro inter la terkulturo kaj flankokupoj. En 1966 la antaŭa konsistigis 87.8% kaj la lasta 11.9% el la totala enspezo.

La kokon-elbobenejo restariĝis en 1978 kaj poste disvolviĝis iom post iom. Nun ĝi fariĝis malgranda moderna fabriko kun pli ol 200 laboristoj kaj ĝia produktokvanto proksimiĝas al tiu de avangardaj japanaj fabrikoj. En

1979 ekfunkciis du toŭfu-farejoj kaj unu silk-teksejo. La disvolviĝo de la kampara industrio ege transformis la kolektivan ekonomion de la vilaĝo. En 1980 la enspezo de la terkulturo de ĝia suda brigado konsistigis 41%, tiu de la flankokupoj 19% kaj tiu de la industrio 40%. Dank' al la disvolvo de la kampara industrio la jara pokapa enspezo atingis 150 juanojn en 1980, je ĉ. triono pli multe ol tiu antaŭ 1978. Koncerne la tutan Suzhou-regionon, en ĝia kampara kolektiva ekonomio la terkulturo konsistigas 19.6%, la flankokupoj 13.2% kaj la industrio 67.2%. El tio oni vidas, ke la kampara industrio de Kaixiangong disvolviĝis kompare malrapide.

La ŝanĝiĝo de la kampara ekonomia strukturo en Kaixiangong ne estas aparta en Ĉinio. Ĝi estas komuna tendenco en la ĉinaj vilaĝoj. Oni diris, ke en la fino de 1979 en la tuta lando 98% de la popolaj komunumoj jam stariĝis kolektivajn entreprenojn. La produktovalorado de la industrio de la komunumoj kaj brigadoj konsistigis jam 9.3% de la totala industria produktovalorado de la lando.

Nun la ekonomio disvolviĝas malegale en ĉinaj vilaĝoj. Granda diferenco troviĝas inter la riĉaj kaj malriĉaj produktaj taĉmentoj. En la plej riĉaj taĉmentoj la jara pokapa enspezo superis mil juanojn, dum en la plej malriĉaj taĉmentoj ĝi estas apenaŭ 50 juanoj. Ĝenerale, la riĉiĝo devenas ĉefe de la flankokupoj kaj industrio. La malriĉaj taĉmentoj ne povas ŝanĝi sian situacion pro tio, ke ili sin okupas sole pri grenproduktado. Tial, por prosperigi la vilaĝan ekonomion oni devas sin turni al disvolvo de flankokupoj kaj industrio.

La antikva urbo Luoyang

de ZHENG ZHENJIE

FININTE la viziton al Sanmenxia, mi daŭrigis mian vojaĝon orienten kaj atingis la antikvan urbon Luoyang, kiu troviĝas 25 kilometrojn sude de la Flava Rivero.

ĈEFURBO DE NAŬ DINASTIOJ

Luoyang situas en la centro de la antikva Ĉinio. En ĝia nordo estas la Flava Rivero kaj Mangshan-monto, en ĝia sudo majeste staras Songshan-monto. Tre facila estas ĝia trafiko surakva kaj surtera. Frue antaŭ 5,000-6,000 jaroj tieaj popoloj sin okupis pri ĉasado, fiŝkaptado kaj terkulturado. Ĉirkaŭ Luoyang ĉinaj arkeologoj trovis plurajn ruinojn de vilaĝoj apartenantaj al la neolitika kulturperiodo. Tie oni ankaŭ elterigis grandan nombron da hakiloj, falĉiloj kaj ŝpatoj el ŝtono, sagpintoj kaj kudriloj el osto kaj korno, multajn pecojn de fajencaj kuiriloj de la prahomoj.

Luoyang estas unu el la ses ĉefaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio (La aliaj kvin estas Xi'an, Pekino, Kaifeng, Nankino kaj Hangzhou). Komence de 770 a.K., kiam la reĝo Pingwang de Zhou-dinastio prenis ĝin kiel sian ĉefurbon, ĝi estis ĉefurbo de naŭ dinastioj dum pli ol 930 jaroj. Ĝia ora tempo estis la dinastioj Sui kaj Tang (581-907 p.K.). Tiam la urbo havis pli ol

milionon da loĝantoj, multajn ŝtatajn oficejojn kaj movoplenajn stratojn.

Luoyang tiam ne nur estis politika, ekonomia kaj kultura centro de Ĉinio, sed ankaŭ internacia urbo pro ĝia facila trafiko kaj ofta kontaktiĝo kun aziaj landoj en ekonomio kaj kulturo. Mi vidis en la Muzeo de Luoyang argilan homfiguron dorsportantan varojn kaj tenantan en unu mano kruĉon, kaj argilan kamelon portantan silkaĵon. Tiuj trikoloraj argilaj figuroj en Tang-dinastio vere spegulas tiutempan interŝanĝon de

ekonomio kaj kulturo inter Ĉinio kaj fremdaj landoj.


HISTORIAJ RESTAĴOJ

Ĉar Luoyang estis ĉefurbo de naŭ dinastioj, ĝi havas multajn historiajn restaĵojn. Veninte al Luoyang, mi vizitis la fame konatan Longmen-ŝtonkavernaron kaj Baima-templon.

La ŝtonkavernaro sin trovas apud la urbeto Longmen dek tri kilometrojn sude de Luoyang.

Starante sur grandspana ŝtona arkponto en nacia stilo, mi vidis antaŭ mi du montojn unu kontraŭ la alia, kvazaŭ du partojn

Trikoloraj argilaj figuroj de Tang-dinastio, elterigitaj en Luoyang



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (3)

de unu sama monto dishakita en mezo. Inter la montoj malrapide fluas la rivero Yishui, sur kiu de tempo al tempo glitas fiŝboatoj. Ja ĉarma pejzaĝo!

La granda parto de la ŝtonaj kavernoj de Longmen troviĝas en la okcidenta monto. Laboranto de la Administrejo por la Historiaj Objektoj de Longmen diris, ke en la Okcidenta kaj Orienta Montoj estas sume 1 352 ŝtonaj kavernoj kun pli ol 97 300 ŝtonaj budho-statuoj, 785 budhaj niĉoj, pli ol 40 pagodoj kaj 3 680 gravuritaj epigrafoj. La konstruado de la kavernoj kaj skulptado de la statuoj daŭris 403 jarojn.


Ĉar mi tiun tagon devis hasti al Baima-templo, mi rigardis nur la kavernon Fengxian de la Okcidenta Monto. Tiu subĉiela kaverno je 35 metroj longa kaj je 30 metroj larĝa estis fosita dum la jaroj de 672 ĝis 675 p.K. Ĝuste kiam mi volis surgrimpi la monton, iu turistoj diris al mi, ke estas pli

interese rigardi ĝin de malproksime. Mi do reiris ĝis la bordo de Yishui-rivero por ĝui la spektaklon. Vere, la ŝtonaj statuoj sur la roko estas kvazaŭ aktoroj sur granda scenejo kun la sidanta statuo de la budho Vairocana en la mezo. Ĝi mienas kviete kaj inteligente. Ĝi altas 17.14 metrojn, ĝia kapo 4 metrojn kaj ĝia orelo 1.9 metrojn. Estas interese, ke la proporcio de la kapo kaj korpo de la budho diferencas de tiu de la ordinara homo. Laŭ la proporcio de la homo, se la kapo altas kvar metrojn, do la torso devas alti dek du metrojn, sed tiu de la budho nur 8.5 metrojn. Oni tamen sentas ĝin tute simetria, kion kaŭzas ĝia malproksimeco kaj pozicio.

Rigardinte la kavernon Fengxian, mi veturis al Baima-templo, kiu distancas dek du kilometrojn oriente de Luoyang. Ĝi kun ruĝa ĉirkaŭmuro sin kaŝas en pinarbaro. Ĝi estas la plej antikva budhisma templo de Ĉinio.

Ĉe la pordo de la templo mi vidis paron da versimilaj ŝtonaj ĉevaloj anstataŭ tradiciajn ŝtonajn leonojn. Administranto diris al mi, ke en la jaro 68 p.K. la imperiestro Mingdi de la Orienta Han-dinastio, kiu kredis je budhismo, sendis delegiton al Hindio lerni budhismajn sutrojn. Hindio ne nur donacis al Ĉinio la 42-ĉapitran Sutron, por ke la delegito ilin reportu, sed ankaŭ sendis du eminentajn monaĥojn al Ĉinio por prediki. La sutro estis alportita per blankaj ĉevaloj, tial post kiam la templo finkonstruiĝis, ĝi estis nomita templo Baima (En la ĉina lingvo "Baima" signifas blankan ĉevalon).

Enirinte la pordon de la templo, mi vidis du ŝtonajn tombojn ambaŭflanke de la portalo, kie eterne ripozas la hindaj monaĥoj. Post la portalo estas kvin haloj unu pli alta ol alia, post kiuj estas loko nomata Refreŝiga Teraso. Laŭdire, la imperiestro Mingdi siatempe studis



Laborejo de la Lagra Fabriko de Luoyang

VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (3)

tie. Kiam ĝi fariĝis templo, oni uzis ĝin por konservi la sutron. Sur la teraso cipresoj skrapas la ĉielon kaj diversaj floroj aromas. La loko allogas al si turistojn per la grandioza halo, graciaj koridoroj kaj valoraj ŝtongravuraĵoj. Tie oni ankaŭ povas ĝui la panoramon de la templo.

Komence la templo estis konstruita imite al la hindaj temploj. Poste oni aplikis ankaŭ ĉinan tradician arkitekturon dum ĝia rekonstruado, tial ĝi kun sia originala stilo estas unu el la ĉinaj antikvaj elitaj konstruaĵoj.

NOVA FIZIONOMIO DE LA ANTIKVA URBO

Pro detruado de militoj dum pluraj dinastioj, la prosperega antikva urbo Luoyang iom post iom kadukiĝis. En 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, ĝi havis areon nur de 4.5 kvadrataj kilometroj kaj 90,000 loĝantojn. Tiam en la tuta urbo funkciis nur kelkaj malgrandaj metiejoj, kaj malaltaj domoj viciĝis ambaŭflanke de mallarĝaj stratoj.

Nun post pli ol 30 jaroj Luoyang havas tute novan fizionomion. Ĝia urbareo pligrandiĝis al 79 kvadrataj kilometroj kaj la nombro de loĝantoj atingis preskaŭ milionon. Sur la mapo oni povas vidi, ke la malnova urbo estas oriente de la novaj kvartaloj, akre kontraste kun la lastaj en la areo.

La larĝaj kaj rektaj ĉefstratoj kaj multaj pavimitaj stratetoj interligas la malnovan urbon kun la novaj kvartaloj. Ambaŭflanke de la stratoj kreskas poploj kaj firmianoj (*Firmiana simplex*). En la tuta urbo oni

konstruis loĝdomojn kun plankareo de pli ol du milionoj da kvadrataj metroj. La urba magistrato tre atentis pri la disvolvado de la kulturo, eduko kaj higieno de la urbo. Jam stariĝis tie 37 hospitaloj kaj sanatorioj kaj 143 altaj, mezaj kaj elementaj lernejoj.

La plej granda ŝanĝo post la fondiĝo de la nova Ĉinio okazis al la industrioj de Luoyang. Nun Luoyang jam fariĝis industria urbo. Tie oni fondis pli ol 400 fabrikojn kaj entreprenojn de ŝtalo, maŝinoj, kaŭĉuko, kemiaĵoj, elektroniko, tekstilaĵoj kaj medikamentoj, kies produktaĵoj nombras 4 000 specojn.

Antaŭ pli ol mil jaroj la ebenaĵo okcidente de la rivero Jianhe estis imperiestra ĝardeno dum la dinastioj Sui kaj Tang. Temen ĝi jam tute dezertiĝis, kiam liberiĝis Luoyang. Nun ĝi estas industria kvartalo, kie funkcias la Unua Traktora Fabriko, Lagra Fabriko kaj Fabriko de Minejaj Ekipaĵoj de Luoyang.

La Unua Traktora Fabriko kun plankareo de 1 440 000 kvadrataj metroj havas pli ol 23 000 laboristojn kaj oficistojn. En 1959 ĝi produktis la unuajn traktorojn de Ĉinio kun la marko Dongfanghong, per kio finiĝis la historio, ke Ĉinio ne povas produkti traktorojn. En la pasintaj pli ol 20 jaroj ĝi produktis sume 254 000 traktorojn kaj 23 000 buldozojn.

Antaŭ veno al la fabriko mi informiĝis, ke la mendo de ĝiaj produktaĵoj malgrandiĝis pro malmulteco de la specoj en la lastaj jaroj. Dum la vizito mi

trovis, ke la gvidantoj kaj laboristoj de la fabriko ne deprimiĝis pro tio. Ili serioze enketis pri la postulo de la merkato kaj decidis plimultigi la specojn de siaj produktaĵoj. Krom daŭrigi la produktadon de 75-ĉevalpovaj raŭpotraktoroj, ili projektis kaj provfaris novspecajn traktorojn. Laŭ la bezono de la nuna ĉina kamparo la fabriko nun produktas malgrandajn traktorojn de 6-7 ĉevalpovoj por pluraj uzoj. Krome ili ankaŭ produktas aŭtojn, biciklojn kaj aliajn vivbezonaĵojn.

Mi vizitis ankaŭ la Lagra Fabrikon de Luoyang, kiu estas la plej granda kaj moderna lagra fabriko en Ĉinio.

La fabrikestro Han Yongfeng akompanis min dum rigardado de kelkaj laborejoj. Li diris al mi, ke la fabriko estis unu el la gravaj konstruaj objektoj plenumitaj dum la Unua Kvinjara Plano de Ĉinio. La fabriko havas domojn kun totala plankareo de 599 000 kvadrataj metroj kaj 16 137 laboristojn kaj oficistojn. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la fabriko produktis 362 860 000 kompletojn da lagroj de pli ol 3 000 specoj. La plej malgranda lagro produktita de ĝi havas internan kalibron de kvin centimetroj kaj pezon de kvin gramoj, dum la plej granda lagro havas eksteran kalibron de kvin metroj kaj pezon de naŭ tunoj. Nun la fabriko pogrande produktas grandegajn, superprecizajn kaj specialajn lagrojn por en- kaj eksterlandaj klientoj.

(Bonvolu legi "La antikva urbo Luoyang" sur la koloraj bildaĵoj.)



KIO ESTAS ESPERANTO KAJ KIA ESTOS ĜIA ESTONTECO?

de GEOFFREY SUTTON


NI scias, ke Esperanto estas lingvo, sed ĉu ĝi estas nur lingvo, kiel iuj asertas? Oni povas lerni Esperanton pro plej diversaj kialoj kaj por plej diversaj celoj, sed unu afero estas certa, Esperanto multmaniere diferencas disde aliaj lingvoj. Mi volas paroli pri tiuj diferencoj. Mi volas paroli pri ili, ĉar ili estas gravaj ne nur por plene kompreni la karakteron de la lingvo, sed ankaŭ por povi bone defendi ĝin kaj por povi plej efike informi aliajn homojn pri ĝi. Plena kompreno pri la bazaj diferencoj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj klarigas ne sole la ekzistokialon de Esperanto, ĝian rolon kaj ĝian celon, sed ankaŭ, mi kredas, povas doni al ni klaran perspektivon pri ĝia estonteco. Ni unue esploru tion, kio plej esence diferencigas Esperanton disde la naciaj lingvoj kaj ni poste vidu, ĉu el tio eblas fari konkludojn pri la estonteco.

Esperanto estas facila kaj logika lingvo. Por lerni Esperanton oni bezonas multe malpli da tempo kaj peno, ol oni bezonas por lerni etnan lingvon. Ĉi tio estas vera kaj eble la plej ofte uzata maniero propagandi Esperanton. La kompara, relativa simpleco de Esperanto sendube estas ĝia plej centra eco. Se Esperanto ne estus pli facila kaj pli logika ol naciaj lingvoj, ĝi ne

havirus ekzistorajton. Multo de la genio de Zamenhof eniris tiajn mirindajn kreaĵojn kiel la afiksa sistemo kaj la tiel nomataj "tabelvortoj". Per ili li povis, kvazaŭ per unu tranĉo, forhaki pezajon el la lernado, kiun ĉiu etna lingvo portas en unu aŭ alia formo. La afiksa sistemo rezultigis la baze skemisman, aglutinan strukturon de Esperanto, kaj Esperanto ŝuldas al ĉi tiu skemisma strukturo sian veran internaciecon. Sen la facileco, la logiko kaj la skema formo Esperanto verŝajne ne vivus hodiaŭ. Sed konstatinte la nemalhaveblan kaj centran rolon de ĉi tiu faktoro, ni povas demandi nin, kiel ĝi valoras por disvolvo kaj disvastigo de Esperanto.

Kio okazas, se oni propagandas Esperanton, uzante sole aŭ preskaŭ sole la argumenton pri ĝia relativa facileco kiel allogilon? Ĉi tio fakte ofte okazis en Eŭropo, eble plej rimarkinde ĉirkaŭ la tridekaj jaroj. Pro ĉi tia informado iuj homoj certe allogiĝas kaj eklernas, sed ĉe la plimulto de informiĝintoj postlasiĝas tre negativa imago pri Esperanto. Kial? Nu, necesas ioma scio pri ĝenerala homa psikologio, kiu verŝajne mankis al tiuj propagandemuloj de la tridekaj jaroj. Ĝenerale-parole, kiam okcidentano vidas Esperanton

propagandatan pro sia relativa facileco, li ne volas ligiĝi al ĝi. Li ne volas rilati kun ĝi, ĉar per tio — li imagas — li montrus, ke li ne kapablas lerni pli malfacilan lingvon. Per lernado de Esperanto li montrus, ke li devas resti kvazaŭ sur pli malalta nivelo. Esperanto tiel fariĝas en la menso de tia homo la lingvo de tiuj, kiuj ne kapablas lerni nacian lingvon; ĝi fariĝas en la menso de la publiko ne la facila Internacia Lingvo por ĉiuj homoj, sed internacia lingvo por la simpluloj! Sekve oni krome pensas, ke Esperanto mem estas iel subnivela lingvo. Tiel ankoraŭ opinias multaj homoj kaj multe kulpis pri tio la informado de certaj rondoj en Eŭropo, kiuj vidis en Esperanto internacian kontaktilon por tiuj en la socio, kiuj antaŭe ne havis ŝancon aŭ tempon lerni fremdan lingvon. Tiel Esperanto renkontis kaj ankoraŭ renkontas malsatimon kaj nekomprenemon ĉe multaj eŭropanoj. La granda tragedio estas, ke tiuj rondoj tute pravis. Esperanto estis kaj restas la plej oportuna interlingvo por ĉiuj tavoloj de la socio, sed provante informi pri tio oni ofte ne sufiĉe atentis la homan psikologion. Oni ne sufiĉe komprenis, ke malgraŭ la nepreco kaj centreco de facila lernado en la internacilingva ideo, aliaj



S-ro Geoffrey Sutton prelegas en la Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio.

argumentoj estas pli akcentindaj, pli gravaj kaj eĉ pli esencaj.

Dua diferenco inter Esperanto kaj aliaj lingvoj estas, ke Esperanto apartenas al ni ĉiuj. Esperanto estas ĉies posedaĵo, dum la etnaj lingvoj restas por ĉiam nedisigeble ligitaj kun la kulturoj kaj popoloj, kiuj denaske parolas ilin. Ĉi tio estas sufiĉe klara eĉ al iu, kiu ne pli bone konas la celojn de la internacilingva ideo. Tamen en la nuna kunteksto necesas diri kelkajn vortojn pri la ne malofte esprimita opinio, ke Esperanto estas eŭropa lingvo. Esperanto elkreskis en Eŭropo, sed ĝia kulturo kaj parolantaro fariĝas ĉiam pli kaj pli vere tutmondaj. Kion do pri ĝia preskaŭ ekskluzive hindeŭropa vortaro? Mi konfesas al vi, ke mi ankoraŭ ne estas certa, kiel respondi ĉi tiun demandon, sed ĉiu studinto de lingvoscienco scias, ke lingvoj nature ŝanĝiĝas

kun la tempoj. Tion jam faris kaj faras Esperanto. Ankaŭ jam de la pasintaj dudek jaroj la eŭropaj esperantistoj mem komencas kompreni, ke ne sufiĉas nur proklami la tutmondecon de Esperanto, por ke ĝi estu tutmonda. Ĝi devas vere esti tia. Ĉiu, kiu interesiĝas pri la demando, ĉu la strukturo de Esperanto estas internacia, tiu plej bone legu la verkon «Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto» de John Wells, lekciisto pri fonetiko en la Universitato de Londono. Li klare montras, ke la strukturo de Esperanto havas tutmondan karakteron.

Ni cetere ĉiam memoru, ke Esperanto el centoj da lingvo-projektoj estas la sola, kiu kapablis ekvivi. Ĉi tion ni ŝuldas grandparte al alia flanko de la genio de Zamenhof, nome liaj personaj kvalitoj de toleremo, komprenemo kaj klarvido. Lia

profunde homama personeco donacis la vivon al lia porhomara lingvo. Tio estis unika okazaĵo en la historio de la homaro, tiel ni devas kapti la donacon eĉ se ne perfektan per ambaŭ manoj kaj ĝin pluevoluigu kaj por nia propra bono kaj por la bono de niaj posteuloj.

Mi ŝatus ĉi-rilate doni unu konsilon al la aziaj esperantistoj. La mondo nun trairas periodon de forta influo de la angla lingvo, kaj Esperanto, estante pli malforta lingvo kaj kulturo, ne povas stari super tiu influado. Aziaj lernintoj de Esperanto, simile kiel eŭropaj, tre ofte plej bone konas kiel fremdan lingvon post Esperanto la anglan. Tiaj homoj facile konkludas, ke Esperanto pli similas al la angla, ol al ilia propra nacia lingvo, uzas tial la anglan, anstataŭ ilia propra nacia lingvo, kiel lingvokomparilon, tiel ke oni ofte trovas en ilia lingvaĵo tre multe da evitindaj anglismoj. Ĉi tio ne helpas la tutmondigon de Esperanto. Esperanto ekzistas kiel ilo por plijustigo de la homaj rilatoj, tial oni zorge atentu ne vastigi la tro unuflankajn influojn de la angla ene de Esperanto mem. Oni simile zorgu ne lasi la eŭropismojn senkaŭze regi. Gardu la skemisman strukturon de Esperanto. Esperanto estas same en la manoj de la aziaj esperantistoj kiel en la manoj de la eŭropaj. En niaj komunaj manoj kuŝas la vortaro kaj la lingvouzo. Sed tio estas tamen kondiĉa je la plena partopreno de la ĉinaj kaj aliaj aziaj esperantistoj. Ankorau vi havas multajn malfacilojn, sed ne staru flanke. Lingvoj estas vere demokratiaj institucioj. Ĉiu unuopulo povas paroli, verki, recenzi, proponi, korespondi, kritiki kaj plendi. Lingvo-akademianoj povas fari

decidojn pri la vortaro aŭ ĝusta lingvouzo, sed finfine en la daŭro de la tempo nur la komuna volo de la parolantaro, moderigata de la gramatiko kaj bon-gusto, fariĝas la akceptita normo. Kaj ĉi tiu akceptita normo tiel mem ŝanĝiĝas laŭ la ŝanĝiĝoj de la tempoj kaj bezonoj de la parolantaro. Se en iu maniero Esperanto devas fariĝi pli internacia, tion decidus per la natura evoluo la kuna forto de ĝia tutmonda parolantaro — tio estas ni ĉiuj.

Multaj ofte ligas Esperanton kun la idealoj de amikeco kaj paco. Esperanto servas kiel ligilo inter la homoj kaj tiel servas al la amikeco. Kvankam mi persone tre bone konscias kiel Esperanto multmaniere povas pli taŭge servi al internacia amikeco ol naciaj lingvoj, Esperanto kiel perilo de internacia amikeco apenaŭ estas unika. Internacia kompreno ja estas antaŭkondiĉo por paco. Ju pli da internaciaj kontaktoj ekzistas, des pli da ŝancoj estas konservi la pacon, sed realisme oni ne povas ne konstati, ke la eblecoj por daŭra paco estas pli rekte influataj de aliaj faktoroj, kiel la ekonomio, sociaj kondiĉoj, ŝtataj interrilatoj kaj simile. En amikeco kaj pacemo oni ne trovas la esencon de la esperantismo. Ili estas nur gravaj, neforigeblaj eroj de la ideo de Esperanto, sed ili mem estas atingeblaj ankaŭ per aliaj rimedoj. Plie oni bone konsciu, ke per bone funkcianta interlingvo oni ankaŭ povas pli bone kvereli kaj malpaci! Ni devas serĉi ankoraŭ aliloken por trovi la decidan diferencon inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj.

Ankoraŭ serĉante la plejesencon de la ideo malantaŭ Esperanto, ni iom ekzameni kelkajn

aspektojn de la nuntempo. En pluraj landoj oni jam okazigis eksperimentojn pri la instruado kaj lernado de Esperanto. Rimarkinda kazo estas tiu farita jam antaŭ longe en Finnlando. Tie la ministerio pri edukado oficiale agnoskis la facilecon de Esperanto kaj la fakton, ke ĝi helpas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj. Kial do oni ne enkondukis Esperanton en la lernejojn aŭ oficiale subtenas ĝin? La respondo kompreneble estas simple tio, ke Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe disvastigita por povi praktike konkuri kun grandaj naciaj lingvoj, malgraŭ ĝiaj pruvitaj avantaĝoj. Kiel ni do povas atingi la bezonatan disvastecon de Esperanto? Al ĉi tiu demando oni povas du-maniere respondi. Unuflanke oni povas argumenti, ke la movado devas kreski ĝis tiu grandeco, kiu estas neignorebla. Aliflanke oni argumentas, ke plej bone estas provi rekte influu la decidpovajn homojn en la socio. Memevidente ambaŭ vojoj estas irendaj. Oni devas kaj plimultiigi la parolantojn kaj konvinki la plej influhavajn homojn, sed miaopinie la movado ne kapablos sufiĉe pligrandigi sin por povi postuli oficialigon. La Esperanto-movado ne estas iu ajn movado, al kiu oni povas simple aliĝi post aprobo de ĝiaj idealoj. Oni devas lerni lingvon, kaj multaj homoj ne pretas lerni Esperanton, kiam naciaj lingvoj proponas al ili pli konkretajn avantaĝojn. En la nuntempo la facileco de Esperanto ne kompensas ĉi tiujn avantaĝojn de la naciaj lingvoj. Kian estontecon do havos nia lingvo?

En multaj landoj oni tro koncentriĝas pri instruado de la angla kaj proporcie neglektas aliajn lingvojn. En tiaj landoj

la tuteca bildo pri eksterlando devias al troemfazo de ĉio anglalingva kaj de ĉio devenanta de la anglalingvaj landoj. En tiaj landoj la angla estas jam la sola fremda lingvo, kiun la plimulto de raportistoj kaj ĵurnalistoj povas uzi, kaj tiel nature sekvas, ke la tieaj homoj estas pli influataj de ĉio anglalingva. Jam en tiaj landoj ne plu sufiĉas kompetentaj tradukistoj por aliaj pli malgrandaj lingvoj. En Svedio ekzemple oni jam atingis la ridindan situacion, en kiu ĉiujare ĉirkaŭ du trionoj de ĉiuj tradukaĵoj al la sveda lingvo estas tradukitaj el la angla. Ĉi tio multe superas la realan gravecon de la angla, en kiu lingvo tamen estis eldonita proksimume unu kvarono de la libroj de la mondo dum la 70-aj jaroj. Rimarku bone, ke tiuj du trionoj de ĉiuj tradukaĵoj el la angla okazas en lando, kie la angla jam estas la fremda lingvo de longe deviga en ĉiuj lernejoj kaj devus esti plej bone scipovata de la plimulto de homoj!

En multaj landoj ankoraŭ fortas la tendenco daŭre pli emfazi instruadon de la angla lingvo. Ĉu ni kiel esperantistoj havas kaŭzon malesperi pro tiu tendenco? Unue, rigardu mondmapon kaj vi rimarkos, ke la plimulto de anglalingvaj landoj estas evoluantaj industrilandoj. Ili estas nun relative riĉaj, kaj eble eĉ pli riĉaj en la estonteco, sed iliaj relativaj riĉeco kaj graveco kompare kun la disvolviĝantaj landoj povas nur malkreski. Tiel ankaŭ la relativa graveco de la angla lingvo simile malkreskos. Tial ne daŭros la nuna internacia lingva situacio. Due kaj plej grave eblas konstati en la hodiaŭa mondo alian fortan tendencon, nome al kreskantaj postuloj por lingvaj rajtoj en

internaciaj kontaktoj. Jam de la fondo de Unuiĝintaj Nacioj dum la Dua Mondmilito ankoraŭ furiozis, oni komencis ellabori la principojn, kiuj poste fariĝis la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. En tiu Deklaracio oni proklamas ne nur la egalrajtecon inter la rasoj, seksoj kaj popoloj, sed ankaŭ la sendistingan egalrajtecon inter la lingvoj kaj kulturoj. Ekde tiu tempo, antaŭ malpli ol kvar jardekoj, ni povas konstati la daŭran pligrandigon de la kvanto de oficialaj lingvoj kaj en Unuiĝintaj Nacioj mem kaj en aliaj internaciaj organizaĵoj. Kompreneble ĉi tiu fenomeno neniel rekte tuŝas la ordinaran homon ĉu en okcidento ĉu en oriento, sed la tendenco postuli lingvan kaj kulturan egalrajtecon por la propra nacio jam de longe komenciĝis kaj estas klare fortiĝanta. Ĉi tio neniel estas surpriza. La lingva kaj kultura egalrajteco fine estas nedisigebla de egalrajteco inter la rasoj, seksoj, religioj kaj popoloj. Ni vivas en tempo, kiam la homoj jam rikoltas la fruktojn de ĉi tiuj noblaj ideoj post jarcentoj de neegala penado. La ideo de egalrajteco ankoraŭ ne plene venkis, sed ĝi jam ĉie troviĝas, kaj neniu povas nei ĝian forton kaj historian gravecon. La justeco estas universala sopiro de la homa spirito. Egalrajtecon en internaciaj rilatoj sole nur la uzo de Esperanto povas proponi. Ĉi tion kapablas doni neniu alia lingvo. Ĉi tio estas tiu plej distingita diferenco inter Esperanto kaj la naciaj lingvoj — tiu plejesenco de la ideo de Esperanto. Ni devas bone konscii, ke ni apartenas al tiu plej nobla kaj nekontraŭstarebla sopiro de la homaro kaj ke tiu nia celo de egaleco en internaciaj kontaktoj ne estas proponebla de la gran-

daj naciaj lingvoj. Tiuj lingvoj en internaciaj rilatoj povas proponi nur diskriminacion kaj superregon, el kiuj la homaro jam dum jarcentoj provas liberigi sin. La anglistoj de «British Council» kaj similaj organizaĵoj de la nuntempaj rutinuloj povas preteksti kiom ajn ili deziras pri la praktika valoro de la angla lingvo. Ili pri tio pravas. Jes, ni kuraĝu diri, ke ili pravas — je la nuna momento. Ne gravas al ni, ĉar ni scias, ke la utiligo de iu ajn nacia lingvo en internaciaj rilatoj ne povas konkuri kun Esperanto, kiam la homo serĉas la samrajtecon. Nur la uzo de Esperanto povas doni la dignon, kiun la socie kaj internacie konscia homo prave postulas por si. Celkonsciaj atentigoj pri la graveco de la egalrajteco ankaŭ en internaciaj kontaktoj per si malfermas novan mondrigardon kaj donas fidon al la progreso de Esperanto. Ĝusta kompreno pri ĉi tiu interna ideo kaj ĝia histo-

ria fono kapablas restigi la komencantojn en la kursoj kaj entuziasmigi la lernintojn, samtempe donante viglon kaj plentrafon al la ĉiam grava informa laboro.

Ni devas konscii, ke ni apartenas al tiu malgranda parto de la homaro, kiu ĉiam metas la idealon de pli bona estonteco antaŭ la pura praktiko de la nuntempo. Ni apartenas al tiu avangarda parto de la homaro, kiu ĉiam batalas por la progresigo de la homaj konceptoj. Nia forto ne bezonas esti la dolaro, ĉar nin apogas la tuta nekontraŭstarebla forto de la historio. La historio pruvas, ke ĉiu granda ideo havas sian tempon. Neniu povas kontraŭstari por ĉiam la naturan progreson de la homa socio al pli kaj pli da justeco. Tial ni scias per la konkludoj de la simpla logiko, ke Esperanto estos akceptita kiel la justa solvo de la internacia lingvoproblemo.

Senpaga Provnumero de El Popola Ĉinio

AKIREBLA POR ĈIUJ
DEZIRANTOJ. Skribu al
nia ĝenerala distribuanto:
Esperanta Sekcio de Guoji
Shudian (Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj), P. O. Kesto
313, Beijing (Pekino),
Ĉinio.

Martha Root—ambasadorino de mondopaco pere de Esperanto



Martha Root (1872-1939)

F-INO Martha Root estis unu el la plej elstaraj personoj, kiujn mi havis la honoron koni pere de Esperanto.

Martha Root estis membro de elstara usona familio, inter kies membroj troviĝis bone konataj diplomatoj kaj advokatoj. Ŝi mem estis ĵurnalistino ĉe la prestiĝa PITTSBURGH COURIER. Ŝi ĉiam havis en sia koro sinceran senton por mondopaco, por edukado al ĉiuj, por egalrajteco inter gevoj. Sed ŝi ne sciis, kiamaniere eklabori por siaj idealoj.

Kiam ŝia patro mortis ĉirkaŭ 1920, li testamentis al Martha sufiĉe grandan monsumon, kaj ŝi decidis vojaĝi al Sud-Ameriko. Antaŭ ol ŝi forvojaĝis, ŝi iris al la ŝtato Maine en nordorienta Usono por pasigi semajnofinon. Tie ŝi konatiĝis kun s-ro George Winthrop Lee, prezidanto de la Bostona Esperanto-Societo. Ĉe la bongusta dimanĉa tagmanĝo ŝi ĝoje anoncis al s-ro Lee, ke ŝi vojaĝos al Sud-Ameriko. S-ro Lee diris, "Martha, lernu Esperanton. Per Esperanto malfermiĝos al vi pordoj nun fermitaj." Martha estis tiom fervora en sia sopiro al mondopaco, ke ŝi ne volis preterlasi plej etan okazon por realigi la deziregon, kaj ŝi eklernis Esperanton. Ŝi fariĝis

sperta esperantistino. Dum la unua eksterlanda vojaĝo al Sud-Ameriko kaj la postaj kvar vojaĝoj tra la mondo, Martha ĉiam uzis Esperanton. En tiuj tagoj estis preskaŭ neeble al unu sola virino vojaĝi, ĉar certe ne estis modernaj facilajoj. Tamen Martha kuraĝis tion fari.

Lidia Zamenhof, ankaŭ kiun mi konis persone, rakontis al mi la jenon: Pro tio, ke Martha Root forlasis la altsalajran postenon ĉe PITTSBURGH COURIER kaj uzis la restantan monon por vojaĝi je la intereso de mondopaco, ŝi kompreneble ne havis sufiĉan monon por modaj vestoj kaj luksaj manĝoj. Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Danzig en 1927, ŝi informiĝis, ke pastro Adreo Cseh estas tiom okupita, ke li eĉ ne havis tempon por tagmanĝi, kaj tuj donis al li sian tagmanĝon, kiu konsistis el pomo kaj ĉokolado!

En artikolo verkita de Martha Root por "Star of the West", mi informiĝis pri ŝia vizito al Ĉinio en 1926. Dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Varna, Bulgario en 1978, s-ino Nada Med, delegitino por Vinkovci, Jugoslavio, montris al mi malnovajn protokolojn

de la loka Esperanto-societo. Tie aperis ankaŭ la nomo de Martha Root. Mi ne scias pri iu ajn lando, kiun Martha Root ne vizitis por antaŭenigi mondopacon pere de Esperanto.

Aŭtune de 1939 Martha Root estis survoje al Usono por instrui kursojn en tiu sama loko, en kiu s-ro George Winthrop Lee konsilis al ŝi lerni Esperanton. En Honolulu ŝi fariĝis tre malsana kaj devis halti tie por sin kuraci. Amemaj geamikoj flegis ŝin. Kelkajn semajnojn poste, tamen, ŝi mortis, malproksime de sia hejmloko. Ĝis la plej lasta spiro ŝiaj pensoj estis ĉiam pri mondopaco kaj monduueco. Ĉe la vojkruciĝo de la mondo staras monumento al ŝi, kiel memorigo al la vivantoj pri la brava batalantino — Martha Root.

Noto de la aŭtoro: La artikolo "Fremdlandaj esperantistoj kaj la ĉina Esperanto-movado" en EL POPOLA ĈINIO, n-ro 06/81 (273) speciale interesas min, ĉar ĝi mencias la nomon de f-ino M. Root. Mi konis ŝin persone.

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekom-

pencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

NOVA LERNILO POR PROGRESANTOJ

Recenzo de LAŬLUM

VIBRAJ MOMENTOJ de Johan Hammond Rosbach, eldonita de Esperantoforlaget A/S (adr.: Olaf Schous vei 18, OSLO 5, Norvegujo). Formato: 24 × 17cm. 83 p. Prezo: 36 norvegaj kronoj. Mendebila ĉe la eldonejo.

Jen estas nova legolibro por progresantoj, kiu diferencas de aliaj samspecaj verkoj per tio, ke ĝi konsistas ne el legaĵoj en diversaj formoj kaj stiloj, sed el 12 skizoj de unu sama aŭtoro kun 371 aldonitaj studaj notoj.

Per sia lerta plumo s-ro J. H. Rosbach prezentas al ni 12 "vibrajn momentojn" travivitajn de li en diversaj periodoj, en siaj 12 rakontetoj "sen pretendo pri literatura valoro" laŭ lia aserto. Mi kredas, ke liaj skizoj pri ekskurso en kamparo, promenado ĉe danĝera pafejo, neordinara morto de ordinara muso, ululado de malnova aŭto simila al tiu de strigo, ŝtela fumado de lernantoj, okulkroĉa jupeto de knabino, atako de tervespoj, solidareco de malfeliĉuloj en faŝista koncentrejo, regalo per ĉina manĝo k. a. certe interesos la legantojn kaj

vibrigos iliajn sentojn. Pri la priskribitaj aferoj mi volus rimarkigi nur pri du punktoj: 1. ne ĉiuj ĉinaj personaj nomoj konsistas el tri partoj, precipe la modernaj ĝenerale konsistas nur el du partoj, nome la familia nomo kiu staras antaŭe kaj la individua nomo kiu ĝin sekvas; 2. dubinda estas la priskribo pri la kuirado de testudo en "GRACHT", ĉar laŭ ĉina kuirmaniero oni devas unue forigi la inteston de la besto post brogado en bolanta akvo kaj kuirigi ĝin kun spicaĵoj nur poste, alie ĝi ne povus esti "bongusta" kiel la aŭtoro asertas en la rakonto.

La studaj notoj konsistigantaj preskaŭ tri kvaronojn de la libro prezentas ne nur utilajn klarigojn pri la tekstoj kaj demandojn, kiuj gvidas la legantojn al pli profunda studo, sed ankaŭ donas konsilojn kaj proponojn pri studmaniero. Kvankam la aŭtoro ne povas doni ĉion konsultindan en la libro por ŝpari prespaĝojn (ekzemple li nur mencias titolojn de legindaĵoj anstataŭ enpresigi la tekstojn), tamen li ĉiam zorgas pri plivastigo de la sciohorizonto de la leganto. Mi trovas la libron havinda por progresantoj al-

menaŭ pro tiuj pli ol 300 studaj eroj.

La presajo, kvankam ne tre eleganta, tamen sufiĉe klara kaj preskaŭ senerara, kio estas unu el la plej gravaj kvalitoj de lernolibro. Kaj krome mi devas diri, ke ĝi enhavas ankaŭ 10 interesajn desegnaĵojn de H. B. Skanlund kiel ilustraĵojn.

Nove Ricevitaj Libroj

KOMPLETA LERNOLIBRO DE REGULA ESPERANTO de L. Mimó, eldonita de la aŭtoro mem (adr.: c/. J. Comas, 19 (C. B) SABADELL, Hispanio). Formato: 15.5 × 21 cm. 192 p. Detala studo pri Esperanto el vidpunkto alia ol tiu de la Plena Gramatiko.

PERKORESPONDA KURSO EN ESPERANTO 10-leciona lernolibro en 10 kajeroj verkita de s-ino Audrey C. E. Childs-Mee. Formato: 21.5 × 14 cm. 100 p. Havebla (ne senpage!) ĉe la aŭtorino (adr.: P. O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando)

LA GEKNABOJ DE KASTELO GREZIJONO lego- kaj instru-libro por infanoj, verkita de s-ino Audrey C. E. Childs-Mee. Formato: 17.5 × 27 cm. 28 p. Prezo: 11.65 gld. Interesitoj sin turnu al la aŭtorino laŭ la supre donita adreso.

FRANKFURT AM MAIN ĈE PULSO DE L' MONDO kolora prospekto pri Frankfurt, havebla ĉe s-ro Walter Ullmann kontraŭ 1 respondkupono (adr.: Danziger str. 283, D-6360 Friedberg (H) 1, FR-Germanio)



ĈINIO UZIS 140 MILIARDOJN DA JUANOJ POR PLIBONIGI LA POPOLAN VIVON

Laŭ statistiko, en la tri jaroj de 1979-1981 Ĉinio uzis 140 miliardojn da juanoj, t.e. 31% de la ŝtata financa enspezo en la tri jaroj, por altigi la salajron, doni premion, havigi laboron, konstrui loĝdomojn kaj doni subvencion pro altiĝo de prezoj de agrikulturaj produktaĵoj kaj iuj varoj.

NOVA SUKCESO DE ĈINAJ VOLANISTOJ

La Tut-Britia Malferma Volana Ĉampionado de 1982 okazis en Londono en la lasta tagdeko de marto. En la kvin konkursoj la ĉinaj volanistoj, kiuj unuafoje partoprenis en la ĉampionado, gajnis du ĉampionecojn, du duajn lokojn kaj tri triajn lokojn. Zhang Ailing gajnis la ĉampionecon de virina unuopa ludo kaj Lin Ying kaj Wu Dixi gajnis la ĉampionecon de virina duopa ludo.

Sportistoj el Danlando, Malajzio kaj Anglio gajnis respektive la ĉampionecojn de vira unuopa ludo, vira duopa ludo kaj miksa ludo.

MODELA SUNENERGIA BAZO KONSTRUATA EN ĈINIO

Modela bazo por sunenergiaj varmigo kaj malvarmigo estas konstruata sudoriente de Lanzhou, Gansu-provinco, en la nordokcidenta parto de Ĉinio.

La konstruado estas subvenciata de la Disvolva Programo de Unu-

igintaj Nacioj (UNDP) kaj plenumiĝos en 1986 laŭ la plano. En la unua periodo de la konstruado oni konstruos en la venonta jaro domegon por sunenergia eksperimentado kun varmo-kolektilo kun areo de mil kvadrataj metroj kaj domojn de diversaj sunenergi-kolektiloj kun totala areo de pli ol 700 kvadrataj metroj. Krome oni ankaŭ plenumos en tiu bazo median verdigon kaj konstruos la instalaĵojn por akvo-kaj elektro-provizado.

La bazo fariĝos centro de Ĉinio en sunenergia esplorado kaj edukado. Ĝi servos ankaŭ kiel eksperimentejo por internacia sunenergia teknika kunlaboro kaj esploro.

CENTRO POR TREJNI FAKU- LOJN PRI NASKOLIMIGO KONSTRUATA EN NANKINO

La trejna centro estas funkciigata de la ĉina registaro kaj subvenciata de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝiaj konstruaĵoj konsistas el ĉefdomo, instrua domo kaj aliaj aldonaj konstruaĵoj kun totala plankareo de 11 000 kvadrataj metroj. La Fonduso de la Loĝantara Aktivado de Unuiĝintaj Nacioj (UNFLA) liveros al la centro kompletojn da modernaj instruaj instrumentoj, ekipaĵoj kaj koncernajn librojn. La centro kulturos fakulojn pri naskolimigo por la disvolviĝantaj landoj.

KARGOŝIPO WANGYUAN TRANSDONIĜIS AL UZANTO

La Dalian-a Ŝipfarejo de Ĉinio konstruis la duan oceanan kargoŝipon Wangyuan kun kapacito de 27 000 toneloj por la Ŝipkompanio Liancheng de Hongkongo. La transdona ceremonio okazis en la ŝipfarejo. La ŝipo kun rapideco de 15.6 mejloj hore longas 197 metrojn

kaj larĝas 23 metrojn. La prova navigado montris, ke ĝi atingis normojn de la tekniko.

LA PLEJ GRANDA ĈINA CENTRO POR TUMORES- PLORADO KONSTRUITA EN PEKINO

La konstruado de la plej granda ĉina centro por tumoresplorado, la Tumora Instituto sub la Ĉina Medicina Akademio, plenumiĝis en Pekino, kaj ĝi ekfunkcios en la fino de la kuranta jaro.

La konstruaĵoj de la centro havas totalan plankareon de 91 000 kvadrataj metroj. Ili inkluzivas 16-etaĝan domon por scienca esplorado, kun 14 etaĝoj surtere kaj du etaĝoj subtere, ambulatorian domon, kiu ĉiutage povas akcepti 1 200 eksterajn malsanulojn, radioterapian domon, kiu ĉiutage povas servi al 1 000 pacientoj kaj malsanulan domon kun 600 litoj. Tie laboros 1 600 sciencaj esploristoj kaj kuracistoj. Tien translokiĝos ankaŭ la hospitalo Ritan, la plej granda tumorkuraca hospitalo en Ĉinio.

La esplora centro estos taskita kulturi fakulojn por diversaj partoj de la lando kaj servos ankaŭ al internacia akademia interŝanĝo.



La Socialisma Spirita Civilizacio en Konstruado

Ĉinio estas konata kiel civilizita kaj morala antikva lando. En la lastaj jaroj, kun antaŭenigo de sia ekonomio Ĉinio metis grandan atenton sur konstruadon de sia socialisma spirita civilizacio. En marto ĉi-jare ĝi lanĉis landskale kampanjon por "Monato de Socialisma Etiko", kaj la vasta popolo montris grandan entuziasmon por tio. En tiu monato dekmiloj da urbanoj aŭ kamparanoj aktive partoprenis en la aktivado por purigi la medion, planti arbojn, observi disciplinon kaj etikon kun la celo konstrui la grandan patrolandon pli pura, pli bela, pli solidara kaj prospera.



Por ke Nia Medio Estu Pli Bela!

Bonorda trafikado

Purigado de promenejo





Geknaboj purigas ŝtonan balustradon antaŭ Tian'anmen-pordego.




Junpioniroj propagandas surstrate la novan trafikajn regularojn.

Helpemo


Helpemaj element-
lernejoj

Helpe al maljunulino en dommastrumado





Por ke la juna pino bone kresku.



Balaado





Vendistino helpas blindulinojn en elekto de varoj.



En ferio junaj laboristoj riparas objektojn de loĝantoj sen postulo de pago.



JARKUNVENO DE LA CHENGDU-A ESPERANTO-ASOCIO

La 7-an de marto la Chengdu-a Esperanto-Asocio okazigis jarkunvenon en la Kultura Domo de Laboruloj. Ĝin ĉeestis pli ol 100 personoj, inter kiuj estis ĝiaj membroj, Esperanto-kursanoj kaj alilokaj esp-istoj. Liu Hongkang, prezidanto de la asocio, raportis pri la en- kaj eksterlanda Esperanto-movado. Ning Shouren, ĝia vicprezidanto, raportis pri la pasintjara laboro de la asocio kaj ĝia agado en la kuranta jaro. En la kunveno oni legis akademiajn disertaĵojn, eksponis kolorajn bildojn pri la historio kaj geografio de ĝia amika urbo Montpeliero de Francio, kaj projekciis lumbildojn en Esperanto donacitajn de francaj samideanoj.

ESPERANTO EN PETROLURBO

Februare, ĉi-jare, en Daqing, fama ĉina petrolurbo, fondiĝis la Esperanta helpstacio, kiun partoprenas 130 junaj laboristoj. La Junula Federacio de Daqing disponigis al ĝi la lernoĉambron, instruilojn kaj aliajn objektojn. La ĵurnalo "Daqing Bao" kaj la Disaŭdiga kaj Televida Stacioj de Daqing raportis pri ĝia fondiĝo. Je la 13-a kaj 14-a de marto oni aranĝis Es-

perantan kurson en la kunveno de la Biblioteko de Daqing, kiun gvidis Yang Ren, vicedestro de la Esperanta grupo sub la Fremdlingva Instituto de la provinco Heilongjiang.

ESPERANTA RUBRIKO EN LA ĴURNALO "JIANGXI RIBAO"

Ekde la 1-a de la lasta novembro ĝis la 3-a de januaro la ĵurnalo "Jiangxi Ribao" de la provinco Jiangxi ekhavis la rubrikon "Pri Esperanto". Ĝi konigis Esperanton per jenaj temoj: "Doktoro Esperanto"; "Kiel Esperanto Estis Enkondukita en Ĉinion?"; "Esperanto kaj Kontraŭfasismo"; "Pri la Zamenhofa Festo"; "La Viena Internacia Esperanto-Muzeo"; "La Perspektivo de Esperanto" k.a.

ESPERANTAJ AKTIVADOJ EN ĈINAJ URBOJ

En februaro la Prepara Grupo de la Kantona Esperanto-Asocio funkciigis rapidan kurson pri Esperanta konversacio, kiu daŭris kvar semajnojn kaj nombris 40 lernantojn. Dank' al tio, ke la kursanoj plejparte povoscias iun alian fremdan lingvon kaj plie jam finis elementan kurson de Esperanto, ili bone progresis. Laŭ invito esperantisto el Hubei-provinco, Xu Daorong, speciale veturis tien kaj gvidis la kurson. La kurso elkulturis por la urbo nombron da aktivaj esperantistoj.

Esp-kurso en Daqing



Je la 23-a de marto la Yunnan-a Esperanto-Asocio kaj Yunnan-universitato kune ekfunkciigis mezgradan kurson de Esperanto, kiun gvidas inĝeniero Bao Shujun. En la lernado partoprenas tradukistoj el kultura, eduka kaj scienco-esplora rondoj, kaj fremdlingvaj instruistoj el Yunnan-universitato, Kunming-politekniko, la Medicina Instituto de Kunming, Yunnan-politekniko kaj la Agronomia Universitato de Yunnan.

Je la 25-a de februaro la esperantistoj de la urbo Shenyang starigis studgrupon. Ili kune kun membroj de la Anshan-a Esperanta Studgrupo ekskursis en Zhongshan-parko kaj Beiling-parko de la urbo.

Dank' al la gvidado de la Scienca Komisiono de Changshu-gubernio, Jiangsu-provinco, kaj la subteno de la gubernia sindikato kaj postlabora lernejo, la 2-an de marto fondiĝis gubernia Esperanta grupo en la Kultura Domo de la gubernio. Jiang Tingzhang, reprezentanto de la popola kongreso de la gubernio kaj estro de la Hospitalo por Tuberkulozo, estis elektita kiel ĝia estro.


ESPERANTO-INSTITUTO DE NEPALO

En oktobro 1981 estis organizita en Nepalo la Jogambara Instituto de Esperanto. Ĝi estas malgranda grupo dediĉita al memstudo kaj disvastigo de Esperanto.

La instituto okazigos Esperanto-ekspozicion en julio 1982 por konigi la sukcesojn de la Esp-movado. Bonvolu sendi ampleksan materialon Esp-an por helpi al la sukcesigo de la ekspozicio en la himalaja reĝlando. Adr.: S-ro Gambhir Man Shrestha, 11/682 Tanlachhy Tole, Kathmandu, Nepalo.

ESPERANTO-GRUPO KARTHAGO-NOVA

Je la 1-a de septembro 1981 fondiĝis oficiale la Esperanto-Grupo Karthago-Nova en la provinco Murcia en la sudorienta parto de



Hispanio. Okaze de la naskiĝdat-reveno de d-ro Zamenhof en decembro ili organizis malgrandan feston, en kiu oni raportis antaŭ pli ol 60 gelernantoj kaj simpatiantoj pri la agado de esperantisto Juan Garcia Pintado, kiu, kiel sola mem-

bro de la grupo en la komenco, sukcesis funkciigi, kun la sindona helpo kaj samideana kunlaboro de amikoj, la elementan kurson en 1979-1980, kaj poste la duan kurson en 1980-1981, en kiu partoprenis 40 geler-

La foto montras la instruistojn de la Esperanto-Grupo interne de la instituto Himenez de la Glavo (Kartageno), kie okazas Esp-kurso kun 27 gelernantoj. Ankaŭ en la Kolegio "Menendez Pidal" ili lernigas Esperanton al 25 gelernantoj.



GOJIGA NOVAĴO EL HINDA UNIO

Inter la 5-a kaj la 7-a de februaro 1982 okazis la unua tuthindia Esperanto-kongreso en Vijayawada, kiu decidis fondi Esp.-organizajn tutlandan. Ĝia nomo estas Federacio Esperanto de Bharato (FEB). Bharato estas esperantigo de la propra nomo de la lando, komuna al pluraj hindaj lingvoj. FEB fondiĝis ne por anstataŭi la ĝisnunajn

E-organizaĵojn en Hinda Unio, sed por kunligi ilin kaj difini iliajn specifajn taskojn en la hinda Esp.-movado. En diversaj lokoj tra la lando troviĝas la filioj de FEB, kiel "FEB en Kalkato", "FEB en Nova Delhio" kc. S-ro K.V. Nath, multe vojaĝinta kaj sperta esperantisto, fariĝis la unua prezidanto de FEB. Adr.: Federacio Esperanto de Bharato, c/o Atheist Centre, Benz Circle, Vijayawada, A.P., Hinda Unio.

69-a JAPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN KAMAKURA


La ĉi-jara tutlanda kongreso de esp-istoj en Japanio okazos de la 28-a ĝis la 29-a de aŭgusto en Kamakura — histori plena kaj turisma alloga urbo.

FILO DE VERDA MAJO EKSTUDIS EN JAPANIO

La 12-an de marto televide tra Japanio oni dissendis la novaĵon ke s-ro Liu Xing, filo de Verda Majo (japana esperantistino veninta al Ĉinio kun sia ĉina edzo antaŭ pli ol 40 jaroj kaj sinofere laborinta por la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio), alvenis en Tokio, realigante sian revon studi en la hejmlando de sia patrino.

Jam pli frue ankaŭ diversloke tra la lando tagjurnaloj informis, ke s-ro Liu estas invitita de Fizikoke-mia Esplorinstituto por studi komputilan sciencan dum unu kaj duona jaroj ĉe la laboratorio de la

Hindaj esperantistoj kunvenas en Vijayawada por ekzameni siajn proprajn fortojn kaj plani la estontecon de Esperanto en Hinda Unio.



nomita instituto. Komune subtenas lian studadon la Japana-Ĉina Asocio por Scienca Interŝanĝo, Japana-Ĉina Amikeca Asocio, parencoj de Hasegawa Teru (la vera nomo de lia patrino) kaj esp-istoj.

Horace Barks apud la vitra ŝranko en la ripozejo de la trink-bufedo "La Verda Stelo Esperanto"



INTERNACIA SEMINARIO PRI SPORTO EN MADRIDO

Sub la aŭspicioj de UEA kaj la Hispana Esperanto-Federacio okazos internacia seminario pri sporto en Madrido de la 8-a ĝis la 11-a de julio, okaze de la ĉi-jaraj Mondaj Futbalaj Ĉampionludoj. La hispana ministro pri transporto, komunikado kaj turismo prezidos ĝian Honoran Komitaton.

La seminario konsistos el labor-kunsidoj kun raportoj de konataj fakuloj, vizitoj kaj ekskursoj kaj distraĵoj aranĝoj. La seminarianoj spektos la finan futbalan maĉon. Estos adoptita fina rezolucio, transdonota al mondaj sportaj instancoj, en kiu la lingva demando sur la sporta kampo estos pritraktita.

Laŭ deziro la seminarianoj povos ĝui alian turisman programon en suda Hispanio, kaj post tio, partopreni en la Hispana Esperanto-

Kongreso en Malaga de la 16-a ĝis la 21-a de julio.

Por ricevi programon kaj aliĝilojn skribu al: Madrida Esperanto-Liceo, Sporta Seminario, Atocha 98, 4°, Madrid 12, Hispanio.

ESPERANTA KURSO NOVZELANDO

Tridek-kvar-leciana kurso de Esperanto komenciĝis en la urbo Palmerston North, Nov-Zelando, ekde la 15-a de februaro. La instruisto s-ro Lee Edwards estas vojaĝanta esperantisto el Usono. La Esperanta Klubo de Palmerston North estas malgranda, sed vigla.

"LITERATURA INFORMILO"

Por ke la literature interesitaj esperantistoj estu ĝustatempe informitaj pri novaj libroj, la Sarlanda Esp-Ligo (FR Germanio) decidis krei apartan bultenon "Literatura Informilo" komence de 1982. Per ĝi oni povas informiĝi regule (almenaŭ dekfoje jare) pri novaj propraj eldonaĵoj, nov-akiroj de ĝia libroservo, specialaj favor-prezaj ofertoj kaj brokantaĵoj.

Pro la ĉiam kreskantaj poŝtaj kostoj la nova servo ne estos senkosta, sed petas modestan jaran kotizon de 10 DM.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	30.1	9965
			26.2	11445
			19.8	15150
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	26.0	11515
			19.7	15165
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.8	15100
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	19.7	15165
			16.9	17745

MALGRANDAJ BESTOMANIULOJ



Tang Xiaokui observas kobajon.

DE la pasinta pli ol unu jaro ĉinaj radiostacioj plurfoje elsendis la dramon “Tri Knaboj Vojaĝas al Serpento-insulo” tre bonvenan al ĉinaj geknaboj. La dramo rakontas, kiel tri elementlernejoj, sen scio de siaj instruistoj kaj gepatroj, forveturis per trajno por malkovri misterojn de la naturo. Ili intencis iri unue al Serpento-insulo proksime de la haveno Dalian por kapti serpentojn, poste al Xisha-insularo en la Suda Ĉina Maro por kapti ĥeloniojn kaj pli poste al Xishuangbanna en la sudokcidenta Ĉinio por esplori tieajn bestojn. Elvagoniĝinte, la tri knaboj piediris tri tagojn pro manko de vojaĝmono. Ili estis malsataj kaj lacaj kaj fine kondukitaĵoj hejmen de unu fervojisto.


La rakonto estas bazita sur realaĵoj. La heroo Tang Xiaokui estas 13-jara lernanto de la unua klaso de la Tria Mezlernejo de Changchun. Iudimanĉe mi vizitis lian familion.

Lia hejmo aspektas kiel laborejo de zoologo. Ĉiuj anguloj de la ĉambro plenas de kestoj, kaĝoj kaj boteloj kun kobajoj, blankaj musoj, kunpremiĝintaj serpentoj, naĝantaj fiŝoj kaj ranoj, lumbrikoj kaj aliaj, kiuj ĉiuj estas zorge nutrataj de la malgranda mastro. La librobretaro estas riĉa je zoologiaj verkoj, kiel “La Evoluo de Estajoj”, “La Interesa Biologio”, “Raraj Bestoj de la Mondo”, “La Serpento” kaj “Notoj pri Bestokaptado”. Sur la skribotablo kuŝas ĉina mapo kun indikoj pri la rezerve-

joj kaj ankaŭ la hejmlokoj de la nordorient-ĉinia tigro, sovaĝa ĉevalo, neĝleopardo kaj blanka simio. Ne estas senkaŭze, ke oni nomas Tang Xiaokui bestomaniulo.

La patro de la knabo nomiĝas Tang Jingyang, kiu estas kadro de maŝina instituto. La patrino Zhang Yushuang instruas kemion en la Normala Instituto de Changchun. La knabo estas iom hontema kaj neparolema. Post nia interkonatiĝo li iris al alia ĉambro por legi libron. Mia interparolo kun liaj gepatroj

Profesoro Fu Tongsheng (la dua de maldekstre) kune kun Tang Xiaokui kaj liaj kamaradetoj en ĉambro de birdaj specimenoj



prenis la foriron de la tri knaboj kiel komencon.

Jam en sia infaneco Tang Xiaokui ekamis bestojn. Lia hejmo sidas proksime de pitoreskejo. Li ofte kun siaj kamaradetoj hokis fiŝojn kaj aŭskultis kvakadon de ranoj ĉe rivero, rigardis birdojn en arbaro aŭ kaptis akridojn kaj libelojn en herbaro. Kiam li estis ses-jara, lia patro kunportis lin al Pekino dum sia oficvojaĝo. Ili pasigis tutan tagon en la Pekina Zoologia Ĝardeno, rigardante rinoce-rojn, hipopotamojn, leonojn, tig-rojn, ursojn, simiojn, elefantojn, ĝirafojn, marbestojn, gorilojn kaj aliajn. La patro laciĝis de irado, sed la filo pli kaj pli interesiĝis. Vespere li bombardis sian patron per la demandoj, kial ĝirafo havas tiel longan kolon, kial hipopotamo havas tiel grandan faŭkon, kiel oni tinkturis la tigran haŭton stria, kaj por kio taŭgas la elefanta rostro.

De tiam Tang Xiaokui montras ankoraŭ pli grandan interenson pri bestoj. Foje la instruisto petis la lernantojn kompletigi la frazon “. . . plej plaĉas al mi”. Iuj skribis “libro”, aliaj “bildo”, triaj “kanto”, sed Tang Xiaokui “kobitido”.


Li tre ŝatas filmojn pri bestoj. Iufoje li eĉ grumblis, ke la pro-

jekciisto nelonge montris la bestojn sur la ekrano. Li estis altirita de la kuriozaj bestoj en la filmoj “Serpento-insulo”, “Birdo-insulo”, “Kaptado de Elefanto”, “Marbestoj” kaj “Xisha-insularo”. Precipe Serpento-insulo forte mirigis lin: En lazura maro troviĝas malgranda insulo, kie vivas dekmiloj da vipuroj, iuj el kiuj sin volvas ĉirkaŭ rokoj aŭ arbobranĉoj kaj iu arbo abundas eĉ je 25 serpentoj. La knabo imagis al si, kiel interese estus kapti tie serpentojn.

Por koni la misteran mondon de la bestoj, Tang Xiaokui diligente lernas koncernajn sciojn. Kiam oni interparolis pri bestoj, li faris detalajn notojn. Li faris la samon dum sia legado. En siaj vortaroj li faris signojn apud la pribestaj vortoj kaj transskribis ilin sur sian kajeron. Li lernas ankaŭ pentri por bildigi la bestojn, kiuj plaĉas al li.

Li ja volas provi la jam ellernitajn sciojn. Iam en lia librosako estis tri boteletoj kun formikoj. Li volis esplori la vivon de tiuj formikoj, kiuj venis el malsamaj lokoj. Post observado li notis: “La formikoj portempe pace kunekzistas, post kiam mi donas al ili kelkajn rizgrajnojn. Sen tio ili batalas inter si. Kiam iu el ili mortas pro mordo, la aliaj ĝin formangas.”

Tang Xiaokui (meze) dissekcas ranon.



Iun tagon Tang Xiaokui legis paĝon en gazeto, kiu priskribas kiel iu angla sciencistino esploras ĉimpanzojn en Afriko. Tang ne plu povis sin deteni. Li venigis du najbarajn kamaradetojn kaj rakontis al ili, kiel la sciencistino vojaĝis foren por la afero, ne timante la atakojn de vipuroj kaj rabobestoj nek la nekutiman tropikan klimaton. Post dekjara klopodado ŝi sukcesis en sia esploro pri ĉimpanzoj. Ŝia sindediĉo tuŝis la knabojn. Ili decidis ekiri la sekvan frumatenton por esplori bestojn sur Serpento-insulo, Xisha-insularo kaj en Xishuangbanna, kaj ne reveni al siaj gepatroj sen fari grandan kontribuon. Tiel la tri knaboj forlasis siajn hejmojn je la 11-a de oktobro 1979. Post ok tagoj ili estis kondukitaĵoj hejmen sen vundaj. La novaĵo pri Tang Xiaokui aperis en la plej granda ĉina ĵurnalo “Renmin Ribao”. Baldaŭ la knabo ricevis varmajn leterojn el diversaj lokoj de la lando. Iu Ŝanhaja knabino sendis al li kompason kun mallonga letero: “Frateto, antaŭe mi legis eksterlandajn aventurajn romanojn, hodiaŭ mi legis pri niaj malgrandaj aventuristoj. Akceptu mian kompason, kiu eble helpas vian entreprenon.” Iu transmara ĉino, kiu sin okupas pri edukado en Kanado, skribis al li: “Ĉi tie mi legis novaĵon pri la vojaĝo de vi kaj viaj du kamaradetoj al Serpento-insulo. Mi tre ĝojas pro via kuraĝo, decidemo kaj granda intereso pri bestoesplorado. Tamen ne decias, ke vi ne sciigis tion al viaj gepatroj kaj instruistoj.”

Tang Xiaokui havas multajn pribestajn librojn, kiujn lia patro aĉetis por li. La elementa lernejo, kiun li vizitis, starigis grupon kun li kiel estro. En la ra-


porta kunveno "Ami Sciencon ekde la Infaneco" okazigita de junpioniroj, li rakontis, kiel reprezentanto de sia grupo, pri la malsameco inter la bestoj de la mondo. Ekzemple, la plej peza besto estas balenoptero, la plej rapidkura estas afrika leopardo, la plej rapidfluga estas apuso, la plej. . . Lia bela rakontado altiris la aŭskultantojn.

Post nelonge Fu Tongsheng, fama ĉina biologo kaj profesoro de la Nordorient-Ĉinia Normala Universitato, akceptis tiujn knabojn kiel siajn kromlernantojn kaj gvidas ilin. La profesoro rakontis al ili pri la dissemiĝo de bestoj kaj ilia interesa vivo.

Tang Xiaokui ricevis diversflankan prizorgadon, kio ankoraŭ pli firmigis lian deziron fariĝi zoologo. En sia artikoleto "Mia Idealo" li skribis: "Mia idealo estas tiel bela, ke je mencio ekaperas en mia kapo grego post grego da bestoj."

La pasintan aŭtunon, kiam li ekvizitis mezlernejon, li dediĉis pli da tempo al studado. Li absorbiĝas en la lecionoj, akurate plenumas hejmtaskojn, legas zoologiajn verkojn, bredas kaj observas bestetojn. Li jam finlegis pli ol 100 tiajn librojn kaj faris pli ol 30 notojn.

Liaj gepatroj diris al mi, ke foje, kiam ili kune kun li iris sur strato, li subite ekkuris. La patro ne komprenis la kialon. Poste la filo diris, ke li volas fariĝi rapidkura por estonte spuri bestojn. Vintre li sin vestas per tre maldikaj vestoj por adaptiĝi al la malvarma klimato de la nordo; somere li kuŝas sub tre dika litkovrilo por adaptiĝi al la varmega klimato de la sudo. Dum liaj someraj ferioj pasintjaraĵo la patro oficvojaĝis al Chang-



EKSPOZICIO DE ĈINAJ TRADICIAJ PENTRAĴOJ EN PARIZO

Marte en la Pariza Muzeo de Moderna Arto okazis ekspozicio de ĉinaj tradiciaj pentraĵoj de Wu Changshuo, Huang Binhong, Fu Baoshi, Pan Tianshou kaj Chen Zhifo, famaj ĉinaj pentristoj en la dudeka jarcento. Estis montrataj 100 pentraĵoj ĉefe pri naturaj pejzaĝoj, floroj kaj birdoj.

Liaj verkoj estis unuafoje ekspoziciataj en Francio. Iuj vizitantoj diris, ke tiuj ĉinaj poeziaj pentraĵoj ne nur donis al ili artan ĝuon, sed ankaŭ ebligis al ili vidi belajn pejzaĝojn de Ĉinio kaj ĝian kulturon de longa historio. La ekspozicio estis aranĝita de la Franca Asocio de Arta Aktivado laŭ la ĉina-franca kultur-kunlabora interkonsento.

METIARTAĴOJ DE JIANGSU-PROVINCO EKSPONITAJ EN AŬSTRALIO

De la 26-a de marto ĝis la 4-a de aprilo en Melburno, Aŭstralio,

bai-montaro kune kun li. Tie Xiaokui petis iun malgrandan montanon esti lia vojaĝgvidisto, kaj ili kune kaptis ses vipurojn.

Post la interparolo liaj gepatroj elvokis lin el la ĉambro, kaj mi demandis lin: "Ĉu vi ne timas vipurojn?" Je mencio de bestoj li tuj vigliĝis, dirante: "Kvankam la vipuro entenas venenon, oni tamen povas subigi ĝin, kiam oni bone konas ĝin." Li aldonis, ke por kapti vipuron,

okazis ekspozicio de metiartaĵoj de Jiangsu-provinco. Estis montrataj Suzhou-aj brodaĵoj, lakaĵoj, jadskulptaĵoj, silkaĵoj, mebloj, ventumiloj el santala ligno, Huishan-aj argilaj homfiguroj de la urbo Wuxi, brunaj fajencaĵoj de la gubernio Yixing, ajuraj tablotukoj k.a. Dum la eksponado metiartistoj demonstris brodadon, pentradon, knedadon de homfiguroj kaj papertranĉadon.

AMIKA AKTIVADO "SALUTON AL HANGZHOU" EN BOSTONO DE USONO

En la mezo de marto komenciĝis la amika aktivado "Saluton al Hangzhou" en la urbo Bostono, Usono. Ĝi estis okazigita sub la aŭspicioj de la Prepara Gvida Komitato por la Amikaj Urboj Bostono-Hangzhou kaj la Bostona Publika Biblioteko. La aktivado inkluzivis raportkunvenon, filmojn kaj ekspozicion. Estis montritaj ankaŭ kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj pri la naturaj pejzaĝoj kaj kulturaj heredaĵoj de Hangzhou.

En la fino de aprilo la delegacio kun la urbestro de Bostono kiel ĉefo vizitis Ĉinion por proklami Bostonon kaj Hangzhou amikaj urboj.

oni devas porti botojn, dikajn ŝtrumpojn, ledajn gantojn, grandan pajlĉapelon kaj aliajn ŝirmilojn, kaj krome oni devas esti kuraĝa kaj singardema, rapidmova kaj akrevida. Oni devas sin gardi ankaŭ kontraŭ juna vipuro.

Ĉe nia adiaŭo, Tang Xiaokui pentris por mi bildon de granda aglo, kiu alte flugas kun etenditaj flugiloj. Fakte ĝi estas simbolo de lia intereso kaj idealo.



Gushan-monto

de FANG YIJIAN

GUSHAN-MONTO norde de Min-rivero impone staras en la orienta ĉirkaŭurbo de Fuzhou, Fujian-provinco. Legendo diras, ke sur la montpinto kuŝis ŝtonego simila al tamburo. Kiam pluvegis kaj ventegis, de tie aŭdiĝis tamburado. Tial ĝi ricevis la nomon Gushan (en la ĉina lingvo "gu" signifas "tamburo" kaj "shan" "monto"). Ĝi estas ĉarma kaj abundas je historiaj restaĵoj. Ĉiujare multe da turistoj vizitas tiun pitoreskejon.

Antaŭ la Liberiĝo, por ĝin viziti oni devis iri laŭ la antikva vojo kun pli ol du mil ŝtupoj. Sed post la Liberiĝo oni konstruis ŝoseon sur la monto por la turistoj. Veturante de Fuzhou per aŭto, oni povas rekte

atingi la parkon antaŭ la templo Yongquan.

El la pli ol 160 vizitindejoj de Gushan-monto la plej fama estas la templo Yongquan, kiu imponas per siaj ruĝaj ĉirkaŭmuroj kaj verdaj tegoloj. Ĝi estis konstruita en 908 p. K. kaj dufoje forbruligita. Post la 17-a jarcento, dank' al multfojaj riparado kaj konstruado, ĝi ekhavis la nunan aspekton. La tuta konstruajaro okupas areon de du hektaroj kaj lokiĝas inter profundaj valoj laŭ montodeklivo. Pro sia ĉarmo kaj racia aranĝo ĝi akiris la famon la krono de la temploj en Fujian-provinco.

Antaŭ la templo troviĝas paro da elegantaj antikvaj pagodoj, kiuj konstruiĝis en la periodo de

Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.). Ĉiu pagodo estas sep metrojn alta, okangula kaj naŭetaĝa. Rigardate de malproksime, ĝi aspektas muldita el fero aŭ bronzo, sed fakte ĝi estas masonita el bakitaj argilaj brikoj. Sur ĉiu pagodo estas 1 038 budhostatuoj kaj sur ĉiuj ĝiaj tegmentorandoj estas skulptitaj po 36 statuoj de bonzoj kaj ĉielaj generaloj. Tial la pagodo ricevis la nomon Argila Milbudha Pagodo.

La ĉefa konstruajaro de la templo konsistas el la Halo de la Ĉiela Reĝo, la Halo Mahavira kaj la Preĝa Halo. Krome en ĝi troviĝas ankaŭ la Sutrokonserva Halo kaj Sonorila Turo kaj aliaj pli ol 20 flankaj haloj. Kaj la

La templo Yongquan



arkitekturo de la templo kaj la skulpto de la budhostatuo atingis altan nivelon. La plej okulfrapa estas la granda sonorilo en la sonorila turo, kiu estis muldita en la erao Kangxi (1662-1722 p.K.) de Qing-dinastio, ĉefe el fero kun aloj de oro, arĝento, bronzo kaj stano, kaj peza je 2 400 kg. Ĝia sono aŭdiĝas 10 km. fore. La sonorilo surhavas unu kolekton de sutro kaj epigrafon, kun sume 6 372 klaraj ĉinaj ideografiaĵoj. Estas mirinde, ke oni tiel lerte aplikis la teknikon de fandado kaj muldado antaŭ 300 jaroj.

Post kiam budhismo estis enkondukita el Hindio kaj Nepalo en Ĉinion en la unua jarcento, ĝi senĉese disvolviĝis kaj fariĝis grava konsistiga parto de la antikva ĉina kulturo. En la Sutrokonserva Halo de la templo bone konserviĝas pli ol 20 000 ekzempleroj de sutraj libroj kaj pli ol 10 000 lignaj gravuritaj presplatoj por budhismaĵ sutroj. Inter la sutroj troviĝas pli ol 600 ekzempleroj, kiuj estas skribitaj de piaj budhanoj per la propra sango. Kvankam ili havas historion de pli ol cent jaroj, tamen la graciaj ideografiaĵoj estas ankoraŭ klare videblaj.

Antaŭ la abatejo kreskas tri cikaso, kiuj allogas al si multajn turistojn. Cikaso estas antikva planto postvivanta post la mezozoiko kaj kreskas kompare malrapide. Pro tio, ke ĝia folio similas al la vosto de fenikso, ĝi alinomiĝas feniksvosta arbo. La arbo havas femalan kaj masklan. La du femalaj antaŭ la abatejo havas aĝon de pli ol mil jaroj. En 1972 oni translukis tien unu masklan el la templo Xichan en Fuzhou. Ili tri havas densan foliaron kaj aspektas impone. Kiam ili floras, iliaj orflavaj flo-

roj kaj oranĝaj semoj aspektas aparte ĉarmaj akompanate de siaj malhelverdaj folioj. Oni diras ke la florado de cikaso estas malofta. Sed la tri arboj floras ĉiujare kaj longtempe: La femalaj floras tri ĝis kvar monatojn kaj la maskla ĉirkaŭ 20 tagojn.

Oriente de la templo situas la kaverno Lingyuan inter du montpintoj, kiu profundas ĉirkaŭ sep metrojn. Laŭ legendo, en la 10-a jarcento, Shenyan, fondinto de la templo, recitis tie sutron. Li malŝatis la senĉesan bruon de la rivereta akvo inter la valoj kaj kriis, svingante sian monaĥbastonon, je kio la rivereto ŝanĝis sian fluon kaj la valo sekigis. Kvankam la antikvaj arboj ambaŭflanke de la valo kreskas impone, tamen en la valo troveblas neniu fontakvo. La supernatura povo de la templofondinto estas ja nur legenda. La vera kaŭzo de tiu miriga fenomeno estas ŝanĝiĝo de la terkrusta strukturo. Ĉe la Torentohaltigejo estas videblaj altaj krutaj kaj groteskaj rokoj, kiuj formas aliajn valojn kuriozajn meze de la valo.

Jam dum centoj da jaroj Gushan-monto per sia ĉarmeco ravas intelektulojn kaj ermitojn, kiuj postlasis multe da skriboj. Nun restas sur la monto pli ol 300 antikvaj surrokaj skribaĵoj. Inter ili pli ol 200 troviĝas ĉe la Torentohaltigejo. Tiuj surskriboj estas faritaj per diversaj stiloj de la ĉina kaligrafio kaj servas kiel valoraj materialoj por studi la ĉinan historion kaj la ĉinan kaligrafion de diversaj dinastioj.

Se oni trapasas laŭ la antikva vojeto apud la kaverno Lingyuan kaj plu promenas laŭ la ŝtonvojo nove konstruita, oni trovas ambaŭflanke de la vojo elegantajn pinojn kaj bambuojn. Ĉiu loko de la pitoreskejo tiel ĉarmas la turistojn, ke ili foriris kun sento de bedaŭro. Se oni surgrimpas al la Kiosko Wangjiang, antaŭ la okuloj tuj prezentiĝas la kunfluejo de la tri riveroj Minjiang, Majiang kaj Wulongjiang, de kie rubanda rivero malrapide fluas orienten. Kunfandiĝas la pejzaĝo de movoplena urbo kaj tiu de kamparo. Se oni rigardas en la kontraŭa direkto, oni trovas, ke la antikva templo Yongquan en verdaj aspektoj pli mistika.


KOREKTO

La dekstra malsupra bildo p. 9 de n-ro 5 estas renversita pro malatento. Ni petas pardonon de s-ro Zhang kaj niaj legantoj.

Pejzaĝoj de Gushan-monto en Fujian-provinco

Fotoj de LAO BAI

Torentohaltigejo inter montoj






Portalo ombrata de arboj




Antikvaj surrokaj skri-
bajoj



Gushan-monto en
malproksimo

Stona Trapasejo



La Argilaj Milbudhaj
Pagodoj antaŭ la templo
Yongquan

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Fotoj de SUDA KAUPP
(FR Germanio)

Strata vinfesto en
malnova mezepoka
urbo en FR Ger-
manio



La Konstanca Lago en FR
Germanio



Firma Knabino

GUTO da freŝa sango estis metita sub mikroskopon. La kemia analizistino surpriziĝis: "leŭkemio?!" Ŝi haste ĵetis rigardon sur la ekzamenan slipton, sur kiu skribiĝis: Zhong Hua, virino, 16-jara . . .

La kuracisto atente reekzamenis ŝiajn simptomojn kaj konstatis, ke Zhong Hua suferas kronikan grajnoĉelan leŭkemion. Zhong Hua estas knabino strebanta al idealo. Ŝi estas lernantino kun altaj notoj en studado, disciplinemo kaj aktive partoprenas en sportado. Ŝi pentras bone kaj havas aspiron fariĝi pentristino. Post kiam ŝi legis libron pri herooj, ŝi volis fariĝi soldato. Tamen nun, vaporiĝis ĉiuj ŝiaj revoj, ĉu la perspektivo, aŭ la idealo. Ŝi ploregis pro la nekuracebla malsano.

Zhong Hua estis enhospitaligita. Tie ŝi rimarkis, ke la vivo estas "kruela" ne nur al ŝi. Tie estis ankaŭ aliaj suferantaj la saman malsanon. Iu junulo, tuj post kiam li sukcese trapasis la eniran ekzamenon de alta lernejo, enhospitaliĝis anstataŭ iri al alta lernejo. Alia juna suferanto estis en arda amo, lia amatino ofte lin vizitis kun fruktoj kaj kukoj, kaj ĉiufoje ili babilis ĝoje. Iufoje, Zhong Hua naive demandis: "Vi jam suferas tiun malsanon. Ĉu via amatino ankoraŭ amas vin?" "Vi jam vidis, ke ni amas unu la alian. Ni geedziĝos post mia elhospitaliĝo." Tiam Zhong Hua pen-

sis en si, ke li estas vere optimisma.

Iun tagon, Zhong Hua larmis ĉagrene. Tion rimarkis iu onklo de najbara malsanula ĉambro. Tiu ridete iris al ŝi kaj diris: "Pro kio? Eble vi sopiras pri la hejmo? Nu, mi ludu erhu-on* por vin amuzi." Li laboras en pekin-opera trupo kaj ludas erhu-on bele. Li ludis plurajn muzikaĵojn, kiuj multe ravis Zhong Hua. Ŝi diris: "Vi ludas tre bele. Instruu min!" De tiam Zhong Hua amas muzikon. Matene, tiu onklo fervore instruis al ŝi ekzerci sin per tajĝiĉuan (ĉina korpoekzerca gimnastiko).


Post kiam Zhong Hua enhospitaliĝis, ŝiaj ĉefinstruistino Chen kaj kunlernantoj ofte ŝin vizitis. Instruistino Chen kuraĝigis ŝin persiste batali kontraŭ la malsano. Ĉio ĉi sentigis al Zhong Hua varmon.

Influante de la konduto de tiuj homoj kiel la optimisma junulo, helpema onklo, la instruistino kaj kunlernantoj, Zhong Hua

konis la veron, ke doni al aliuloj oportunon kaj varmon estas kontribuo al la socio kaj signifoplena por la vivo. Ankaŭ ŝi volas varmigi aliulojn per sia vivo.

Zhong Hua fariĝis iom post iom vigla kaj ŝia korpo pli forta. Kaj ŝi komencis purigi la malsanulan ĉambro, fari kotonstangojn, porti trinkakvon al aliaj malsanuloj. Ŝi pentris portreton por flegistinoj kaj malsanuloj. Foje, kampara malsana knabino neniel konsentis elsuĉi sian medolon por kontrolo pro timo de doloro. Tiam Zhong Hua diris al la flegistino: "Unue eltiru la mian!" La flegistino injektis al ŝi anestezaĵon kaj poste enigis dikan injektilon en ŝian vertebron. Ŝi senĝeme eltenis la doloron. Post la elsuĉo ŝi delitiĝis kaj saltante diris al la knabino: "Jen, ŝi jam faris al mi elsuĉon. Por kuraci la malsanon estu kuraĝa kaj ne timu doloron!" Dank' al ŝia persvado la knabino

Zhong Hua (maldekstre) studas kune kun sia kamaradino.



fine konsentis ke la flegistino elsuĉos medolon. Por konsoli la junan malsanulon, kiu pretas edziĝi, Zhong Hua tondis por li kvar ruĝpaperajn ĉinajn ideografiajn simbolantajn feliĉon. La kuracistoj kaj la malsanuloj emocie diris: “Kvankam la knabino malsaniĝis tiel grave, tamen ŝi pensas ne pri si mem kaj varme zorgas pri aliaj. Ŝia koro estas pli pura ol kristalo.”

Dank’ al la zorgema kuracado de kuracistoj, la malsano de Zhong Hua iom post iom mildiĝis. Post nelonge ŝi elhospitaliĝis kaj revenis al sia hejmo por ripozi. En la hejmo ŝi ne volis kuŝi sur lito senfare. Ŝi organizis infanojn loĝantajn najbare kaj instruis al ili kantadon, dancadon kaj aliajn amuzajn. Ŝi ellernis ludi akordionon kaj per ĝi akompanis la infanojn en kantado. Lastjare, la eksterlerneja centro por elementaj lernejoj de la loĝantara komitato de la kvartalo, kie ŝi loĝis, estis elektita kiel elstara eksterlerneja centro. Ankaŭ ŝi gajnis honoran

ateston kaj premion. Vidante, ke la filino estas okupata tuttage, ŝia patrino admonis: “Vi devas bone ripozi kaj ne laciĝu!” Zhong Hua tamen diris: “Panjo, mi ne sentas lacon. Tia vivo estas pli signifa.”

Post kiam Zhong Hua malsaniĝis, ŝin prizorgis varme la ĉirkaŭaj personoj.

En la vespero de la Aŭtunmeza Festo, ŝiaj kunlernantoj invitis ŝin al la lunrigarda amuzvespero. En la Printempa Festo, ŝiaj gvidantoj, instruistoj kaj kunlernantoj de la lernejo ŝin vizitis kun donacoj.

Por ne aflikti Zhong Hua, ŝiaj kunlernantoj ne parolis kun ŝi pri ŝia malsano. Siaflanke Zhong Hua, timante, ke ŝiaj kunlernantoj maltrankviliĝos pro ŝia malsano, neniam montris antaŭ ili sian malĝojon. Kelkiam ŝia malsano graviĝis kaj terure turmentis ŝin. Tiam ŝi pensis en si, ke eble ŝi mortos tiufoje kaj afliktiĝis pro tio. Tamen, antaŭ siaj gepatroj kaj kunlernantoj ŝi ankoraŭ diris

ridete: “Ne gravas, ĉu mi statas ne bone?” Ŝi kaŝe diris al sia intima amikino: “Eĉ se mi mortus morgaŭ, hodiaŭ mi ridetus antaŭ miaj kunlernantoj, por ke ili ne malĝoju pro mi.”

Post unu jaro Zhong Hua iom resaniĝis. Ŝi diris al sia patrino: “Panjo, nun mi sentas min multe pli bone. Mi volas denove viziti la lernejon por akiri pli da scioj. Kiel mi laboros sen scioj?” La patrino ne povis deadmoni ŝin kaj vole-ne-vole konsentis ŝian peton.

La lernejo konsentis, ke ŝi lernu en la antaŭa klaso. Konsiderante ŝian specialan staton la lernejo permesis, ke oni ne faru registradon pri ŝiaj lernotagoj, ŝi ne partoprenu en sportado, nek faru deĵoron de klasĉambra purigo, nek plenumu sian hejmtaskon kaj ŝi lernu laŭ sia ebleco.

Zhong Hua tamen sin traktis tre rigore. Kiel antaŭe ŝi rigore observis la disciplinon de la lernejo. Frumatene de iu tago, Zhong Hua trovis antaŭ ellitiĝo, ke sango elfluas el ŝia nazo. Sangado estas plej maltrankviliga por leŭkemia suferanto.

Pro tromalmultiĝo de la trombocitoj, la sangado estas malfacile haltigebla. Sur la planko ĉie estis kotonbuloj ruĝigitaj de sango. La patrino haste enbuŝigis al ŝi medikamenton kaj faris malvarman kompreson al ŝia frunto. Tamen la sangado ankoraŭ ne haltis. La patrino admonis ke ŝi ne vizitu la lernejon, sed Zhong Hua, ŝtopinte siajn naztruojn per koton, iris al la lernejo.

En la klasĉambro, instruisto trovis, ke sango elfluas el la nazo de Zhong Hua, kaj ad-



Zhong Hua transdonas al la infanoj de infanvar-tejo manĝaĵojn donacitajn de aliaj al ŝi mem.

monis ŝin rapide hejmenreveni por preni medikamenton kaj ricevi injektadon. Tamen Zhong Hua persiste aŭskultis la matematikan lecionon. Post la foje-refoja admonado de la instruisto ŝi konsentis hejmenreveni akompanate de siaj du kunlernantoj. En la sekva tago, post ĉesigo de la sangado, Zhong Hua denove iris al la lernejo.

La leŭkemiaj suferantoj facile laciĝas. Sur la vojo por reveni al la hejmo Zhong Hua ofte estis tiel laca, ke ŝi apenaŭ povis levi siajn du piedojn. La gepatroj trovis nenian rimedon kaj ordonis, ke ŝia pli juna fratino akompanu ŝin en iro al la lernejo kaj en reveno al la hejmo kaj dorsportu por ŝi la librosakon.

Post la refoja vizito al la lernejo, Zhong Hua eklernis la lecionojn de la dua klaso de la alta mezlernejo. Pro la malsano ŝia memorpovo malfortiĝis.

Tial ŝi havis multajn malfacilojn en sia lernado. Tamen, Zhong Hua obstine faris malfacilan konkurson kun sanuloj. Kelkfoje, kuŝante en la lito, ŝi ankoraŭ foje-refoje parkebligis matematikajn formulojn. Ŝi skribis en sia taglibro: "La kruta vojo kondukas al la venko kaj ĝin povas surgrimpi nur la kuraĝuloj." Tiamaniere, ŝi bone plenumis la lernotaskon same kiel aliaj lernantoj . . .


Foje, en la matematika testo Zhong Hua per 97 poentoj gajnis la trian lokon en sia klaso. Ŝi sukcese trapasis la semestran ekzamenon en kvin kursoj. In-formiĝis pri ŝiaj bonaj notoj iu kuracisto, kiu kuracis la malsanon de Zhong Hua, mire diris: "Tio estas neimagebla! Tiu knabino havas mirindan volon!"

La 12-an de februaro, la nomo de Zhong Hua aperis en "Pekina Ĵurnalo" de la ĉefurbo de


Ĉinio kaj ŝiaj kortuŝaj faroj rapide disvastiĝis tra la tuta lando. La Eksperimenta Fabriko de la Medikamenta Instituto sub la Ĉina Medicina Akademio sendis al Zhong Hua novajn tablojdojn. Laborantoj de iu ĉinmedicina drogvendejo en Pekino sendis al ŝi varmoplenan leteron kaj novan medikamenton kontraŭ leŭkemio. Multaj personoj de diversaj partoj de la lando sendis al ŝi unuj post aliaj leterojn, medikamentojn, memoraĵojn, nutraĵojn kaj esprimis al ŝi siajn bondezirojn. Sennombraj junuloj estis inspiritaj de ŝiaj kortuŝaj faroj. Hodiaŭ, lernante de ŝi la noblan penson kaj obstinan batalspiriton, la geknaboj kaj junuloj diligente lernas por fari sin utilaj al la patrolando.

* Ĉina dukorda arĉmuzikilo

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Wujiang-gubernio
3. Luoyang
4. Fuzhou
5. Chengdu
6. Nankino
7. Daqing



Jiang Zhaohé

DUAN WU:

JIANG ZHAOHE — MAJSTRO-

INTER poŝtkartoj eldonitaj de la redakcio de EPĈ estis peco kun tuĉpentrita portreto de d-ro Zamenhof. Ĝi estas verko de la fama ĉina pentristo Jiang Zhaohé.

S-ro Jiang estas nuntempa majstro-tuĉpentristo de Ĉinio. Lia originala stilo en la arto forte influas la ĉinajn belartajn rondojn kaj ludas gravan rolon en kombino de la ĉina pikturo kun la okcidenta.

En 1904 li naskiĝis en malriĉa intelektula familio en Luzhou, Sichuan-provinco. Lia patro estis lerta en verkado de poemoj, kaligrafio kaj pentrado. Jam en

sia infaneco Jiang eklernis pentradon helpe de sia patro kaj elmontris sian talenton. En la aŭtuno de 1920 16-jara Jiang Zhaohé iris al Ŝanhajo serĉi laboron pro malriĉeco de sia familio. Li tie pentris afiŝojn kaj aranĝis montrofenestrojn de magazenoj, per kio li apenaŭ povis sin vivteni. La diversaj maljustaĵoj en la homa mondo pliprofundigis lian konon pri la vivo. Tiam li diligente lernis desegnadon, oleopentradon kaj skulpturon. En 1925 li kreis verkon “Familio de Rikiŝisto”, ekde tiam li strikte ligis sian verkadon kun la malfeliĉo kaj suferoj de la laboranta popolo.

En 1928 la fama ĉina pentristo Xu Beihong revenis de Francio post finiĝo de sia studo tie. Li konatiĝis kun Jiang kaj baldaŭ ili fariĝis intimaj amikoj. Xu alportis el Francio progresemajn librojn, journalojn, bildoalbumojn kaj verkojn de Kathe Kollwitz k.a., kiuj larĝigis la vidkampon de Jiang. Li prenis malriĉulojn kaj malfeliĉajn popolanojn kiel objektojn de sia pentrado. Pro tio li ofte renkontis malestimon kaj ĝenon, tamen li neniam ŝanceliĝis sur sia vojo. En 1936 li komencis pentri homfigurojn. Li diris: “Tiuĵ, kiuj konas miajn pentraĵojn, estas malriĉuloj en la mondo.”

Post kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937, Jiang laboris kiel instruisto en Beiping (nun Pekino) regata de la japanaj agresantoj kaj sin vivtenis per pentrado de portretoj. Foje li faris portreton por la fama ĉina medicinisto s-ro Xiao

Parto de la “Bildo de Rifugiintoj”



TUĈPENTRISTO DE ĈINIO

Longyou. En lia hejmo li konatiĝis kun lia filino Xiao Qiong — studentino de arta kolegio. Tiam la bela fraŭlino estis ĉirkaŭata de aro da riĉaj junaj adorantoj. Malgrasa kaj kvieta Jiang estis nek riĉa nek belaspekta, tamen s-ro Xiao per la akra vido de kuracisto rimarkis en li ion neordinaran. Li tre alte taksis lin kaj instigis sian amatan filinon edziniĝi al Jiang. Tamen la afero estis longe prokrastita pro okupiteco de Jiang en sia verkado. Nur en la printempo de 1944, kiam li atingis sukceson en sia arto, li edziĝis al Xiao Qiong. Nun lia edzino estas fama ĉina kaligrafo.

En 1942 Jiang ne plu povis sin deteni de silento antaŭ la kruelecoj de la japanaj agresantoj kaj profundaj suferoj de la ĉina nacio. Pli kaj pli maturiĝis en lia kapo la komponaĵo “Bildo de Rifuĝantoj”. Post unu kaj duona jaroj plenumiĝis la pentraĵo

alta je du metroj kaj longa je 27 metroj, sur kiu estas pentritaj pli ol cent personoj grandaj je veraj homoj. Ĉiuj ili estas baraktantaj en rifuĝado. La artisto per realisma tekniko reaperigis orfojn kaj vidvinojn en senelirejo, mortantan maljunulon, patrinon kun sia ĵus mortinta infano en la brakoj, kriplajn laboristojn kaj malriĉajn intelektulojn.


En septembro 1943 Jiang ruze trapasis la kontrolon de la koncerna instanco de la japanaj okupantoj kaj la pupa reĝimo kaj eksponis la pentraĵon en Beiping.

kiu vekis sensacion. Sed la ekspozonado daŭris apenaŭ duontagon, japanaj ĝendarmoj kaj policanoj sin trudis en la ekspozicion, ordonis fermi ĝin kaj deprenis la pentraĵon de sur la muro.

“Bildo de Rifuĝantoj” estis tute freŝa en tiama belarta rondo pro sia aparta arta lingvo. Eĉ nun la arta sperto de tiu pentraĵo havas realan signifon por traktado de tipaj homfiguroj, rompo de la koncepto pri takso de la tradiciaj ĉinaj pentraĵoj kaj kombino de la ĉinstila kaj



El la “Bildo de Rifuĝantoj”





Printempa Sema-
do

de JIANG ZHAOHE

okcidenta pentrarto. En 1957 Jiang Zhaohe kunportis la pentraĵon al Sovetunio kaj eksponis ĝin en Moskvo kaj Leningrado. Ĝi skuis la sovetuniajn belartajn rondojn kaj li estis nomata "orienta Repin".

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio radikale ŝanĝiĝis la vivo de la pentristo kaj ankaŭ lia arta stilo: Sereneco anstataŭis la melankolion. Li pentris multajn heroojn kaj labormodelojn, feliĉajn patrinojn, gajajn kamparanojn kaj viglajn infanojn, per kiuj li prezentis popolanojn en feliĉa vivo. Li ankaŭ kreive pentris multajn grandajn historiajn personojn.

En la pasintaj multaj jaroj li instruis en la Centra Belarta Instituto de Pekino kaj sukcesis resumi sian longan artan praktikadon per kompleto da principoj por belarta instruado. Li publikigis serion da disertaĵoj kaj disvolvis modernan tuĉpentradon de homfiguroj sur la bazo de la ĉina tradicia pikturo. Nun nemalmultaj novaj steloj en la ĉinaj belartaj rondoj kiel ekzemple Wang Ziwu, Fan Zeng k.a. formis sian propran stilon ĝuste sub lia influo. Li ja elspezis grandan energion por kulturi tiujn junulojn. Nun Jiang Zhaohe jam havas 78 jarojn, tamen li ankoraŭ diligente laboras per sia peniko.

ZORA HEIDE*:

LA

EN la malplena lernejo, post la fino de la taga instruado, sidis nur du personoj: La patro kaj mi. Li sidis ĉe la skribotablo, ordigante ordinaran kaj ĉiutagan administradon, kaj mi sidis en la unua benko, kiu staris en la meza vico. Mi estis tiutempe lernantino de la kvara klaso.

Antaŭ mi kuŝis nur neuzita blanka desegno-papero, koloraj kraĵonoj kaj pomo. Granda, rozkolora, elektita de mi inter multaj pomarboj en la ĝardeno. Mi nenion faris krom, de tempo al tempo, jetadi rigardon al tiuj aferoj, kvazaŭ miaj okuloj desegnus imagan strion inter la blanka papero, la pomo kaj mia patro, kiu estis la sola instruisto en la vilaĝo.

Tra la malfermitaj fenestroj trapenetris knarado de vilaĝanaj ĉaroj ŝarĝitaj per diversaj rikoltoj, reveno de laktoplenaj bovinoj, porka gruntado kaj la krioj de ludantaj infanoj.

Eduki min estis tre peza tasko por mia patro. Mia temperamento esprimis siajn eksplodojn diversmaniere. Mia obstineco pri la propra volo ne konis limojn. Mi mem opiniis, ke por desegni oni bezonas talenton kaj ĝin mi ne posedis. Kutime dum la horo de la desegnado helpis min ofte spertaj gelernantoj, kaj ankaŭ mia patro mem, sed ĉifoje obstina ne estis nur mi.

POMO

(Novelo)

“Desegni pomon ne estas mal-facila tasko, kaj vi mem devas prove fari tion sen helpo de la aliaj,” li diris, direktante la vortojn al mi kaj poste al la klaso:

“Ne helpu ŝin, mi petas, ŝi devas mem desegni pomon.”

Mia devo talentigi sentalentecon kreis tiel fortan kontraŭstaron, ke mi rifuzis fari eĉ provon.

“Helpu min,” mi diris al mia najbarino, “kion ajn vi volas, mi donos al vi.”

“Mi ne intencas malobei sinjoron instruiston kaj krome mi ne volas helpi vin, ĉar vi rifuzis helpi min rilate iun respondon pri historio. Kaj cetere, vi mokis min dum mi legis iun rakonton. Ĉar vi estas la filino de nia instruisto, ne opiniu, ke ĉio devas esti laŭ via volo.”

“Vi estas impertinenta, neniam plu mi ludos kun vi, nek pruntedonos al vi librojn,” mi akre respondis.

“Mi ne plu emas ludi kun vi. Librojn mi povas pruntepreni de sinjoro instruisto.”

La bruo de nia akra diskuto interrompis la silenton. La fakto estis klara: ĉiuj staras ĉe la patra flanko. Mia obstineco kreskis obstine.

La patro alproksimiĝis.

“Ĉiuj provis fari la taskon escepte de vi. Post la instruado



Zora Heide

vi restos kun mi en la klaso, eĉ dum la tuta nokto, se necesos.”

La mokado de la gelernantoj, ĉar mia patro min punis, estis netolerebla. Mia obstino kreskadis.

Pasis horoj. Antaŭ mi kuŝis neuzita blanka desegno-papero. Mia patro estis okupita per la laboro, kvazaŭ mi tute ne ekzistis.

Mi meditis pri tio, ke mi formanĝu la pomon. Sed en tiu okazo mi certe estus devigita trovi alian.

Eniris mia patrino kun du glasoj da lakto kaj vespermanĝo. Ŝi jam aŭdis pri la okazaĵo de la gelernantoj. Ŝi nenion diris al mi, nek al la patro. Ŝi foriris, kaj ni denove restis solaj.

Mi meditis pri tio, ke mi nepre devas peti helpon de la patrino. Kvankam mi antaŭsciis, kion ŝi respondus al mi: “Desegni pomon estas tasko facila, kaj krome vi nepre obeu la patron.”

Horoj pasis. La ŝoseo malpleniĝis. Krepusko kaj baldaŭ mal-lumo regos. Mia patro lumigis la lampon kaj revenis al la laboro.

Mi rigardis la pomon kaj la neuzitan blankan paperon, pro kiuj mi restos la tutan nokton en la klaso.

Fine la silento lacigis min kaj mia obstino rompiĝis. Mi prenis la kraĵon kaj per du strioj montriĝis silueto de pomo.

Mia patro tuj rimarkis, ke io okazis. Li alproksimiĝis.

“Kolorigu ĝin,” li diris kontente. “Ĝi estas rozkolora kun verda supraĵo.”

Mi daŭrigis senproteste. Post kelka tempo mi finis la laboron. Mi rigardis la desegnaĵon kaj la pomon. Kial mi ne tuj tion faris?

Mia patro ordigis la tablon, kaj mi prenis la desegnaĵon, kraĵojn kaj la pomon.

Senvorte ni eniris freŝan aeron. Fore oni aŭdis sonojn de kantantaj gejunuloj, kaj subite ĉio ĉirkaŭ ni silentiĝis.

Enirinte la ĉambron, mi ne formanĝis la pomon. Mi metis ĝin sur la ŝranketon kaj tuj endormiĝis.

** S-ino Zora Heide naskiĝis en Jugoslavio kaj lernis Esperanton de sia patro, kiam ŝi estis tre juna. En 1960 ŝi edziniĝis al dana esperantisto kaj ekloĝis en Danlando. Ŝia unua novelaro “Ni, homoj...” aperis en 1970.*





Koko kun blanka plumaro kaj nigraj ostoj

La nigraosta Wushan-koko produktita de Taihe-gubernio, Jiangxi-provinco, Ĉinio, diferencas de aliaj kokospecioj per sia originala aspekto. Ĝi havas fenikso-forman kreston, verdajn orelojn, blankan plumaron kaj nigrajn haŭton kaj karnon. Ĝi altiras rigardantojn per sia gracia korpo. Ĝia juna karno estas tre nutra kaj krome entenas violan pigmenton, el kiu oni faras medikamenton, kiu helpas plimultiigi sangajn globulojn kaj pigmentojn de homo. Ĝi estas tonika kaj havas specialan kuracan efikon al virinaj malsanoj. Ĝi estas ĉefa ingredienco por la valora porvirina medikamento "Nigrakoka kaj Blankafeniksa Pilolo", kiu havas debiton en Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĝi estis difinita kiel tributo en la regperiodo (1736-1796) de la Qing-dinastia imperiestro Qianlong kaj ricevis laŭdon en la Panama Internacia Foiro en 1915.

Hidno

La hidno estas speco de granda fungo kun bongusta kaj nutra karno. Ĝi entenas riĉan proteinton kaj plurajn vitaminojn, pro kio oni nomas ĝin vegetala viando. Jam antaŭ ĉ. 3 000 jaroj ĉinoj komencis kolekti ĝin por manĝi. En Ĉinio la hidno estas unu el la kvar plej

famaj pladoj (la aliaj tri estas ursa piedo, holoturio kaj ŝarka naĝilo).

Hidno konsistas el du korpoj, nutra kaj genera. La nutra korpo estas ŝnureca hifo, kiu asimilas akvon kaj nutraĵojn de la gastiganto. Post certa tempo elkreskas la genera korpo el la surfaco de la gastiganto. La hidno ja estas fungo de tia genera korpo, kiun oni nomas bazidiofrukto. La freŝa bazidiofrukto estas blanka, kun supro granda kaj malsupro malgranda. Ĝi, plena de karnecaj pikiloj, tre similas kapon de simio, pro kio la ĉinoj nomas ĝin simia kapo.

La sovaĝa hidno kreskas en montaj arbaroj de iuj ĉinaj provincoj, en la temperaturo de 18°-22°C. En la naturo ĝi kreskas malrapide, tamen en grandegan fungon. Foje en Baokang-gubernio, Hubei-provinco oni rimarkis hidno-reĝon, kiu ne estis eĉ dorse portebla por homo.

La hidno servas ankaŭ kiel valora medikamento, kiu estas milda kaj dolĉa. Ĝi havas ecojn digestigan, tonikan kaj kontraŭkanceran. La tablojdo ei hidna hifo kuracas la

Hidno produktita de Fanĵing-monto, Guizhou-provinco



kancerojn stomakan, ezofagan kaj kardjan.

Ruĝa sako-karpo

La ruĝa sako-karpo vivas en Wu-yuan-gubernio, Jiangxi-provinco, Ĉinio. Oni nomas ĝin tiel, ĉar ĝi havas ruĝan koloron kaj similas al sako. La karpo estas tre vivema kaj rezistema kontraŭ malsaniĝo. Ĝi kreskas rapide kaj ĝia karno estas grasa kaj bongusta. Oni preparas pladon el ĉi tiu bona karpospecio de Ĉinio por bone funkciigi siajn lienon, pulmojn, hepaton, koron kaj seksorganon.

Tian karpon oni komencis bredi en Wanli-periodo (1573-1620) de Ming-dinastio. Laŭdire, la imperiestro donacis paron da ruĝaj sako-karpoj, breditaj en lia ĝardeno, al Muyuan-ano Yu Maoxue, ministro de la Imposta Ministerio, pro lia merito. Poste tiu emeritiĝis kaj kunportis la du karpojn al sia hejmloko por bredi. Tie plimultiĝis tiaj karpoj generacion post generacio.



Amantoj de aviadil-modeloj

Ami Sciencon ekde la Infaneco

Fotoj de KANG BIN

Iuj ĉinaj institucioj ofte aranĝas eksterlernejajn aktivadojn por vekti intereson de geknaboj pri sciencoj. Ĉi tie ni prezentas al niaj legantoj landskalan sciencan aktivadon partoprenitan de diversnaciecaj geknaboj.

Scivolemo pri kosma sekreto





Kolektado de plantaj specimenoj



Fizika eksperimentado sub direktado de instruisto



Interesa kemia reakcio



Atenta farado

ĈINAJ ESP-ISTOJ

Kantistino Qiu Zimin

Fotoj de WANG SHOULIANG

Qiu Zimin estas kantistino de la Pekina Ensemblo kaj komencanta de nia lingvo. En la lasta jaro ŝi ekvizitis Esperantan kurson kaj perdis sistis en la lernado. Dank' al sia diligenteco ŝi jam povas legi Esperantajn librojn kaj kanti Esperante. Februare de la kuranta jaro ŝi kantis Esperantajn kantojn en la Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio kaj ricevis laŭdojn de la kunvenantoj.



Qiu Zimin




Sinekzercado per Esperanta kanto



Qiu Zimin (dekstre) en lernado de Esperanto

Korpoekzercado en mateno



Si kantas Esperante en la Dua Kongreso de la Pekina Esperanto-Asocio



Kiel mi servas al eksterlandaj gastoj

de LIU YUSONG

La aŭtoro estas 29-jara aŭtisto de la Dua Servo de la Ĉefurba Aŭtovetura Kompanio de Pekino. Lia edzino estas 27-jara servistino de la hotelo Jingxi en la sama urbo.

La Red.

Mi estas aŭtisto de la Dua Servo de la Ĉefurba Aŭtovetura Kompanio, kiu servas ĉefe al gastoj, komercistoj kaj turistoj el aliaj landoj.

Mi stiras mezgrandan pasaĝeran aŭtomobilon klimatizitan por eksterlandaj turistoj. Sed plejparto de ni parolas neniun alian lingvon krom la gepatra, kio tre maloportunas por la laboro. Foje mi veturigas kelkajn eksterlandanojn al la Somera


Palaco, kaj post la vizito ili alparolis min kun gestoj, sed mi ne komprenis ilin. Mankis al ni interpretisto, pro kio mi tre maltrankviliĝis. Mi havis neniun alian rimedon krom reveturigi ilin al la Pekina Hotelo. Poste venis interpretisto kaj diris al mi, ke ili volis veturi al la vendejo "Amikeco", kiu aparte servas al eksterlandanoj.

Mi estas fervora por miaj klientoj. Mi kontrolas mian aŭ-

ton tri fojojn ĉiutage por sekurigi la veturadon. Ofte mi purigas la aŭton kaj helpas maljunulojn porti siajn valizojn. Sed la lingva baro malhelpis mian laboron kaj tial mi volis lerni la anglan lingvon. Ankaŭ niaj kompaniestroj kuraĝigis nin por tio. Dum la lastaj jaroj nia kompanio funkciigis fremdlingvan kurson por lernigi ofte uzatajn vortojn al novaj junaj aŭtistoj.

Ĉar ni ne laboras en fiksita tempo, estas maloportuna por ni la regula lernado, pro kio mi ĉiam kunportas lernolibron, kaptante ĉiun minuton por lerni. Eĉ najbaraj lernantoj, interpretistoj kaj turistoj fariĝis miaj "instruistoj". Foje mi servis al iu pli-ol-70-jara usona gastino. Ekvidinte, ke mi lernas la anglan lingvon, ŝi memvole helpis min prononci literojn kaj legi novajn vortojn. Tiel ŝi gvidis min dum pluraj tagoj. Je la adiaŭo ŝi donacis al mi anglan vortaron, sur kiu estas skribitaj ĉinaj vortoj, kiujn ŝi ĵus lernis: "Mi esperas, ke vi bone lernos la anglan lingvon. Via usona amikino."


Post lernado de pli ol unu jaro mi posedis la ofte uzatajn vor-



Liu Yusong

tojn. Mi ekzercadis mian langon ĉiam kaj ĉie. Iun tagon mi kondukis la aŭton al la flughaveno por veturigi aerskipon de la Aviada Kompanio Lufthansa de FR Germanio. La germanoj volis viziti vidindejojn de Pekino dum siaj kvin-sestagaj ferioj inter du aerveturoj. Sed la dekkelkaj germanoj ne atingis unuanimeton: Iuj volis viziti la Imperiestran Palacon, aliaj la Someran Palacon kaj triaj la Grandan Muron. Kaj ili tuj ekĝojis, kiam mi diris al ili, ke ĉiuj tiuj lokoj estas pririgardindaj, kaj proponis al ili aranĝon por tio. Tiu aŭ alia germana aerskipo venas al Pekino unu fojon semajne, tiel ke mi havas okazojn por fari servojn. Mi laŭeble plenumis ilian peton. Ekzemple, kiam ili volis rigardi prezentadon de kantoj kaj dancoj, mi antaŭmendis biletojn por ili. Foje kiam la biletoj estis elĉerpitaj,

Antaŭ veturigo



mi longe staris ĉe la pordo de teatro por atendi superflujajn biletojn de aliuloj. Kiam la germanoj volis rigardi la gimnastikon Tajĝiĉuan kaj la spiran gimnastikon en parko, mi frumatene kondukis la aŭton al ilia hotelo. Ili ankaŭ volis aĉeti ĉinajn bambuajn infanĉaretojn, sed mi ne trovis eĉ unu, trabutikinte plurfoje. Tamen post mia longa klopodado ili ĉiuj akiris po unu kaj ĝoje forlasis Pekinon.

Mi ne scias, kiu el la skipoj faris vizitkartojn kun miaj nomo, telefonnumero kaj servoloko kaj ilin distribuis al la aliaj skipoj. Poste, kiam la germanoj atingis Pekinon, ili tuj telefonis al mia servoloko, por ke mi veturigu ilin. Pasintjare mi servadis ilin sinsekve sep monatojn, de frua mateno ĝis profunda nokto. Mi diligente laboradis, tiel ke nia kompanio ricevis laŭdon kaj pli da enspezo. Miaj gvidantoj ĉiam donas al mi grandan zorgon. Iam mi malfrue finis mian laboron kaj miaj gvidantoj urĝis min reveni hejmen por ripozi kaj ili mem provizis mian aŭton per benzino.

Mi varme servis ankaŭ al nebonhavaj turistoj. En la komenco de la pasinta jaro 15 studentoj el Hongkongo luis mian aŭton. Mi aŭdis, ke ili perlaboris la vojaĝmonon dum siaj ferioj kaj restos en Pekino nur kvar tagojn. Mi faris konvenan aranĝon por ilia vizito kaj volonte fariĝis ilia vojpgvidisto. Tiuj gejunuloj el la sudo neniam vidis neĝon. Ilin tiklis la lago de Beihai-parko kovrita de glacio. Mi deadmonis ilin surglaciigi pro la printempa degelo. La sekvan tagon, kiam mi estis reveturiganta ilin de la Granda Muro, mi vidis apud la vojo malprofundan rivereton kun dika tavolo da glacio. Mi halti-

gis la aŭton kaj kondukis ilin tien, kie ili sin distris pli ol du horojn. Mi faris nenium ĉirkaŭiron por laŭeble redukti ilian veturkoston. Poste ili volis nepre rekompenci min per la ŝparita mono, sed mi diris al ili, ke ni ne postulas trinkmonon kaj la servado estas nia plenumenda devo. Ĉe la adiaŭo ili manpremis min dirante: "Vi estas malmulte salajrata, sed bonkora." Por mi nenio alia estas pli ĝojiga ol laŭdoj el miaj klientoj.

Komprenoble ne ĉio en la vivo estas agrabla. Iun printempan tagon de 1978, dum mia veturigo, renkonte al mi rapidegis ŝarĝaŭto, kiu estis preterkuranta alian aŭton ne laŭ la trafikaj regularo. Por eviti akcidenton mi haste bremsis mian aŭton kaj vundis biciklantan lernanton. La ŝarĝaŭto forkuris, sed mi estis senigita je aŭtista rajto por du monatoj kaj pro tio oni ne altigis mian salajron. Mi ĉagreniĝis kaj plendis pri tio. Sed la akcidento pripensis min pri la jeno. Dum la lastaj jaroj konstruiĝis en Pekino du ĉirkaŭurbaj stratoj kaj pluraj trefkruciĝoj kaj larĝiĝis multaj stratoj, dank' al kio ekregis orda trafiko. Sed en nia urbo troviĝas du-tri milionoj da bicikloj kaj restas nemalmultaj mallarĝaj stratoj, kaj krome certaj biciklantoj kaj aŭtistoj ne observas la trafikajn regularojn, pro kio ni aŭtistoj devas esti tre singardemaj. Ekde tiam mi turnis mian atenton al preterpasantaj aŭtoj kaj homoj. Mi trovis, ke iuj junuloj ŝatas bicikli rapide, alilokanoj vizitantaj la urbon emas rigardadi tien kaj alien kaj en pluva tago pasantoj, kies okuloj estas ŝirmitaj de pluvmanteloj, ne povas klare vidi la veturilojn. Mi elpensis rimedojn kontraŭ ĉiaj eblaj akcidentoj. Dum tiuj kvar jaroj mi sekure

veturigis preskaŭ centmil kilometrojn. Iu el miaj klientoj laŭdis: “La strato estas kvazaŭ rivero, la rapidkuraj bicikloj tien-reen iras kiel sennombraj fiŝoj, kaj via aŭto kiel boato veturas libere inter la fiŝoj.” Ĉi-febuare mi estis elektita kiel avangarda aŭtisto de la urbo. Mi ricevis la ateston kaj premion, kiujn mi montris unue al mia edzino Limin. Ŝi tre ĝojis, ĉar ankaŭ ŝi havas meriton ĉirilate.


Mi konatiĝis kun ŝi, ĝuste kiam okazis la akcidento kaj min kaptis malbona humoro. Ŝi donis al mi konsolajn kaj kuragiĝajn vortojn. Mi amas ŝin pro ŝia beleco kaj des pli pro ŝia bonkoreco. Pro la amo ŝi donacis al mi fontoplumon kaj notlibron, kiujn ŝia hotelo donis al ŝi kiel premion, kaj ankaŭ naztukon kun ambirdoj kaj versoj broditaj de ŝi mem. Mi ne estas altkreska nek riĉa, do mi ne scias, pro kio ŝi amas min. Post nia geedziĝo ni loĝis en la domo konstruita antaŭ la domo de miaj gepatroj. Mia edzino ne plendis, sed beligis la dometon per siaj lertaj manoj. La litŝirmilo kaj tablotuko estis broditaj de ŝi. Por ke mi bone plenumu mian longan laboron, ŝi prenis sur sin preskaŭ la tutan dommas-trumadon kaj tutkore flegas mian maljunan patriron. Ĉiufoje, kiam mi revenis hejmen en profunda nokto, ŝi preparis manĝaĵon kaj infuzis teon por mi. Matene antaŭ mia vekigo ŝi senbrue metis apud mia kapkuseno miajn vestaĵojn, kiujn ŝi lavis, kaj nur post tio ŝi iris al la hotelo. Ŝi ofte diris al mi: “Atinginte nian flughavenon, eksterlandaj gastoj vidas unue la interpretiston kaj aŭtiston, do ĉi tiuj devas porti purajn vestaĵojn, kvankam mankas al ili luksaj.” Ankaŭ mi te-

La tuta familio




nas min tre ame al ŝi. Ĉiufoje, kiam mi venis hejmen pli frue ol ŝi, mi bone preparis pladojn plaĉajn al ŝi, kaj post tio mi iris al la aŭtobus-haltejo por atendi ŝin. Ĉiumonate ni ambaŭ enspezas ĉirkaŭ 120 juanojn, inkluzive la kromsalajron, el kiu sumo estas ĉirkaŭ 40 juanoj superflua

por ni. Antaŭ kelkaj monatoj ni transloĝiĝis en la etaĝdomon por laboruloj de la hotelo Jingxi, tamen ni ofte vizitas miajn gepatrojn. De la du jaroj post nia geedziĝo ni vivas harmonie kaj feliĉe. Antaŭ nelonge naskiĝis al ni aminda dikuleto, kiu alportis plian ĝojon al nia familio.



Paro da makulharaj hundetoj

Pentrita de
YE CHUNYANG



La periodo de Militantaj Regnoj

de BA HONG

POST la intensa porhegemonia batalado dum pli ol 200 jaroj en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, Ĉinio eniris en la periodon de Militantaj Regnoj (475 a.K.-221 a.K.), pereis multaj malfortaj feŭdulaj regnoj kaj restis nur sep regnoj: Qi, Chu, Yan, Han, Zhao, Wei kaj Qin.* Tiam la agonianta kortego de Zhou-dinastio jam tute paralizigis politike. Ĉiuj estroj de la sep regnoj unu post alia deklaris sin reĝo. Por akiri pli da tero kaj loĝantoj ili kondukis aneksajn militojn pli grandskalajn kaj pli intensajn ol tiuj en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Jen kelkaj rakontoj pri milita kaj politika luktado dum la periodo.

MALING-KAMPANJO

De la mezo de la 5-a jc. a.K., Wei-regno iom post iom prosperigis, aneksis grandan teritorion sude de la Flava Rivero kaj gajnis al si hegemonion super la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero, pro kio naskigis antagonismo inter ĝi kaj Qi-regno. En 342 a.K. Wei-regno atakis Han-regnon, kiu petis helpon de Qi-regno. Laŭ la propono de milita konsilanto Sun Bin, la reĝo de Qi-regno esprimis sian volon helpi Han-regnon, sed ne tuj sendis la trupon. La sekvantajn jaron, kiam ambaŭ rivaloj preskaŭ forkonsumis siajn fortojn, la reĝo de Qi-regno komisiis al Tian Ji kaj Sun Bin

helpi Han-regnon kun la armeo sub ilia komando. La reĝo de Wei-regno sendis generalon Pang Juan kaj kronprincon Shen komandi centmil armeanojn por fari rebaton.

Sun Bin bone sciis ke Wei-armeo estas forta kaj fiera, pro kio li faris falsan evakuon por allogi la malamikojn. En la unua tago de sia evakuo la armeo de Qi starigis fornojn por prepari manĝaĵojn por centmil soldatoj, en la dua tago duone tiom, en la tria tago ankoraŭ malpli nur por prepari manĝaĵojn por dudekmil soldatoj. Trompate de tio, Pang Juan diris al siaj subuloj: "Mi ja scias ke Qi-armeo estas tre timema kaj ne kuraĝas ba-

tali kontraŭ ni. Vidu, nur en tri tagoj la nombro de la dizertintoj superis jam duonon de la tuta armeo de Qi." Kaj li sen infanterio kaj diversaj provizajoj kondukis grupon da husaroj por persekuti la rivalojn.

Laŭ la kalkulo de Sun Bin, ke la armeo de Wei tiunokte devis atingi Maling (nordoriente de la nunaj Juancheng-gubernio de Shandong-provinco). Tie la vojo estis mallarĝa kaj ambaŭflanke de ĝi dissemiĝis obstakloj. Apud la vojo li embuskigis dekmil arkpafistojn, parte senŝeligis iun arbegon kaj skribis sur la senŝeligita trunko: "Pang Juan mortos sub la arbo!" Sun Bin ordonis ĉiujn embuskulojn pafi

Vidinte la vortojn "Pang Juan mortos sub la arbo", Pang Juan tuj ordonis la trupojn retirigi.



sagojn tuj kiam fajro ekflamos.

Tiunokte la armeo de Wei sub la gvido de Pang Juan atingis Maling. Estis malhela nokto de oktobro. La avano de la armeo de Wei estis obstrukcita ĵus kiam ĝi atingis Maling. Pang Juan rigardis antaŭen kaj vidis ion malklaran sur la arbo. Li ordonis bruligi torĉon. Leginte la ideografiaĵojn, li tuj ordonis la tutan armeon retiriĝi. Sed jam estis malfrue. Vidinte la fajrolumon, arkopafistoj de la armeo de Qi embuskantaj ambaŭflanke de la vojo tuj ekpafis. Hajloj da sagoj dronigis la armeon de Wei en kompletan malordon, iuj estis pafmortigitaj, aliaj mortis de tretado de ĉevaloj. Trovinte nenian eliron, Pang Juan sin mortigis. La kronprinco estis kaptita viva.

Sun Bin estis fama strategiisto en la periodo de Militantaj Regnoj. Li verkis libron pri milita arto, kiu perdiĝis antaŭ longa tempo kaj estis trovita nur en 1972 en la antikva tombo de Yinque-monto, Shandong-provinco. Nun ĝi post reordigo jam estis eldonita kun la titolo "Milita Arto de Sun Bin". Lia avo estis milita specialisto Sun Wu, kiu trejnigis palacajn servistinojn en Wu-regno, pri kiu rakontis la artikolo "La Periodo de Printempo kaj Aŭtuno" en la lasta numero de nia gazeto.

VENKI YAN-ARMEON PER FAJRAJ BOVOJ

En 284 a.K. Yan-armeo, komandate de Yue Yi kaj kunage kun la armeoj de la regnoj de Qin, Zhao, Han kaj Wei, atakis Qi-regnon. Ili fiaskigis Qi-armeon kaj mortigis la reĝon de Qi-regno.

Sub la komando de generalo Yue Yi, Yan-armeo konkeris pli ol 70 urbojn de Qi-regno. Kaj tiam por Qi-regno restis nur du urboj Ju kaj Jimo (la nunaj Jukaj Pingdu-gubernioj de Shandong-provinco).

Tiam Tian Dan estis elektita de anoj de Jimo kiel ĉefo por rezisti al la malamikoj. Informiĝinte ke la nova reĝo de Yan-regno suspektis kaj enviis Yue Yi, Tian Dan dissemis onidiron, ke Yue Yi delonge volis reĝi super Yan-regno. Kiam la onidiro atingis la orelojn de la reĝo de Yan-regno, tiu nomumis la malkapablan Qi Jie ĉefkomandanto anstataŭ Yue Yi.

Post tio Tian Dan dissemis alian onidiron, ke armeanoj de Qi perdos la tutan kuraĝon por batali, se oni fortranĉos la nazon de la kaptitoj el ilia trupo. Aŭdinte tion, Qi Jie vere fortranĉis la nazon de la kaptitaj anoj de Jimo kaj lasis ilin reveni hejmen, kio indignigis la popolanojn de la urbo.

Poste, Tian Dan dissemis ankoraŭ alian onidiron, ke la anoj de Jimo plej timas detrui iliajn prapatrajn tombojn, ĉar tio ĉagrenos ilin, ke ili deprimiĝos en la defendo de sia urbo. Aŭdinte tion, Qi Jie ordonis detrui tiujn tombojn. Vidinte ke la ostoj kaj kadavroj de la prapatroj estas disjetitaj ĉie ekster la urbo, la anoj de Jimo eksplodis de indigno kaj konkure petis ataki la malamikojn.

Tian Dan trovis ke venis por li la batalŝanco. Por trompi la malamikojn li kaŝis la elitajn trupojn kaj postenigis nur maljunulojn, malfortulojn kaj virinojn por defendi la urbon. Samtempe li sendis iun al Yan-armeo por false

kapitulaci, per abundaj riĉaĵoj koruptis ĝiajn generalojn, petante: "Post nelonge Jimo kapitulacos al vi. Sekurigu mian tutan familion, kiam nia urbo estos konkerita." Pri tio la Yan-generaloj nenion dubis kaj faris nenion alian krom atendi la kapitulacon de Tian Dan.

Tian Dan kolektis en la urbo pli ol 1 000 bovojn, surmetis sur ilin buntajn brokatojn kaj ligis akrajn glavojn al iliaj kornoj kaj oletrempitajn kanabajn fibrojn al iliaj vosto. En la lasta nokto antaŭ la falsa kapitulaco, Tian Dan ordonis ataki la armeon de Yan. La anoj de Jimo ekbruligis la oletrempitajn trenajojn sur la vosto de bovoj. La muĝantaj bovoj ĵetis sin rekte al la kampadejo de la armeo de Yan. 5 000 bravuloj kun diverskoloraj vizaĝoj kaj akraj glavoj sturmis post la bovoj. Sub la komando de Tian Dan urbanoj kriante sin ĵetis al la malamikoj en tamburado, dum la maljunuloj, malfortuloj kaj virinoj frapis bronzaĵojn por ilin kuraĝigi. Vekitaj el sonĝo, la Yan-regnaj soldatoj forte terurigiĝis. Ili panike forkuris, piedpremante unu alian. Kaj sennombraj estis la mortintoj. En eskapado Qi Jie estis pikmortigita de Tian Dan. La armeo de Qi rapide postkuris la malamikojn, reprenis siajn pli ol 70 urbojn. Kvankam Qi-regno venkis Yan-regnon, tamen ĝiaj fortoj suferis grandegan perdon kaj de tiam ĝi ne plu povis batali por hegemonio.

CHANGPING-KAMPANJO

En 266 a.K. la reĝo Zhaogong de Qin-regno nomumis Fan Sui ĉefministro, plifortigis enlande la centran aŭtoritaton kaj praktikis eksteran politikon

amikiĝi kun la malproksimaj landoj kaj ataki la proksimajn. La najbara Han-regno estis multfoje atakita de Qin-regno. Por akiri pacon la reĝo de Han-regno iniciatis oferi al ĝi parton de sia teritorio. Sed la garnizoj ne obeis la ordonon kaj donacis la terpecon al Zhao-regno. Pro tio inter la regnoj Qin kaj Zhao estiĝis konflikto. Por gardi sin kontraŭ la armeo de Qin, Zhao-regno sendis Lian Po kiel komandanton garnizoni en Changping (nord-okcidente de la nuna Gaoping-gubernio de Shanxi-provinco), dume Qin-regno sendis Bai Qi ataki la lokon. Tiel komenciĝis la plej grandskala kampanjo en la periodo de Militantaj Regnoj.

Konsiderinte ke Qin-armeo batalas malproksime de sia lando kaj strebas al rapida batalo, Lian Po konstruigis altajn fortikaĵojn por efike defendi sin kaj eviti decidan batalon kontraŭ la malamiko. La milita sindeteno daŭris tri jarojn. La armeo de Qin ne povis elteni longdaŭran militadon kaj inside dissemis onidiron: "Lian Po maljuniĝis kaj ne kuraĝas batali. La armeo de Qin plej timas Zhao Kuo. Se li komandus armeon, do la armeo de Qin nepre malvenkus."

Zhao Kuo estis filo de la fama generalo Zhao She. Ekde sia infaneco li komencis legi verkojn pri milita arto. Li montris grandan lertecon en parolo pri milita arto kaj eĉ lia patro estis ofte refutita de li. Antaŭ sia morto, Zhao She testamentis al sia edzino: "Kuo neniam komandu en batalo. Alie Zhao-regno certe malvenkos."

Trompita de la artifiko de Qin-regno, Zhao-regno anstataŭ-

igis Lian Po per Zhao Kuo, spite la oponon de ties patrino. Kiam Zhao Kuo atingis la fronton, li tuj lanĉis grandan atakon. La armeo de Qin false retiriĝis, kaj la armeo de Zhao sin ĵetis rekte al la malamika kazerno. Estis neatendite, ke du taĉmentoj de la armeo de Qin tranĉis al la armeo de Zhao vojon por provizaĵoj kaj retiriĝo. La armeo de Zhao estis sieĝita 46 tagojn. Ne povante elteni malsaton, fine ili faris sieĝrompon. Zhao Kuo mem estis pafmortigita. La komandanto de Qin-armeo Bai Qi liberigis nur 240 junajn kaptitojn kaj enterigis aliajn pli ol 400 000 kaptitojn vivaj.

Post Changping-kampanjo, Zhao-regno ne plu povis batali por hegemonio.

ATENCO AL QIN-REĜO FARE DE JING KE

Qin-regno pereigis Han-regnon en 230 a. K., kaj aneksis Zhao-regnon en 228 a. K. kaj kaptis ĝian reĝon. Sekve de tio, Qin-armeo rekte atakis Yan-regnon, kiu milite ne povis rezisti kontraŭ Qin-regno kaj esperis atenci la reĝon de Qin-regno.

En 227 a. K. la kronprinco Dan de Yan-regno venigis bravulojn Jing Ke, Qin Wuyang kaj perfidulon de Qin-regno Fan Yuqi por komploti por kaŝmortigi la reĝon de Qin-regno. La enhavo de la plano estis: Por akiri konfidon de la reĝo de Qin-regno, Fan oferos sian kapon. Proksimiĝante al la reĝo, Jing donacos al li la mapon pri teritorio

Jing Ke eltiris la ponardon kaj sin ĵetis al la reĝo de Qin.



koncesiita de Yan-regno. En la mapo estos kaŝita ponardo ŝmirita per veneno. Kiam Qin-reĝo rigardos la mapon, oni kaptos kaj mortigos lin per ĝi.

Jing Ke, en vestoj de sendito de Yan-regno, kune kun Qin Wuyang venis al Qin-regno kunportante la kapon de Fan Yuqi. Aŭdinte ke la perfidulo Fan Yuqi estis jam mortigita, Qin-reĝo ĝojegis kaj tuj donis aŭdiencon al la "sendito de Yan-regno". Jing Ke kaj Qin Wuyang venis al la palaco Xianyang. En la palaco staris multe da militistoj kun glavoj. Kaj Qin Wuyang paliĝis de teruro kaj tutkorpe tremis. La servistoj de Qin-reĝo forte miriĝis kaj demandis: "Kial li paliĝis?" Jing Ke kun rideto respondis: "Li estas kamparano kaj neniam vidis la majeston de via granda lando." Qin-reĝo neniom dubis pri lia mensogo kaj ordonis lin prezenti la mapon. Kiam Qin-reĝo foliumis la mapon, Jing ke subite kaptis lian manikon per la maldekstra mano, eltiris la ponardon en la mapo per la dekstra kaj ra-

pide jetis sin al la reĝo. La reĝo terurigiĝis, eksaltis, deŝiris la manikon kaj sin kaŝis malantaŭ la ekranego. Jing Ke tuj lin postkuris. La reĝo kuradis ĉirkaŭ la kolono persekutate de la murdanto. Laŭ leĝo la armitaj gardistoj estis malpermesitaj proksimiĝi al la trono sen ordono de la reĝo, kaj tiam la reĝo eĉ ne havis tempon por ilin voki. Li volis eltiri la spadon ĉe la talio, sed ne sukcesis en hasteco. Iu el la servistoj kriis: "Eltiru ĝin de post la dorso, via reĝa moŝto!" La reĝo puŝis la spadon dorsen kaj sukcesis eltiri ĝin. Tenante la spadon la reĝo batalis kontraŭ Jing Ke kaj dehakis lian maldekstran kruron. Jing Ke falis apud la bronzan kolonon kaj ne povis leviĝi. Li forte jetis la ponardon al la reĝo, tamen ĝi flugis preter lia orelo. Nur tiam la gardistoj kuris en la palacon kaj mortigis Jing Ke kaj Qin Wuyang.

En 222 a. K. Qin-regno pereigis Yan-regnon kaj en la sekvanta jaro ĝi aneksis Qi-regnon

kaj tiamaniere unuigis la tutan Ĉinion. Qin-reĝo fariĝis la Unua Imperiestro de Ĉinio. De tiam finiĝis la periodo de Militantaj Regnoj.

* *Qi-regno situis ĉe la nunaj provincoj Shandong kaj Hebei.*

Chu-regno situis ĉe la nunaj provincoj Sichuan, Hubei, Hunan, Jiangxi, Anhui, Shaanxi, Henan kaj Jiangsu.

Yan-regno situis ĉe la nunaj provincoj Hebei, Liaoning kaj Shanxi.

Han-regno situis ĉe la nunaj provincoj Shanxi kaj Henan.


Zhao-regno situis ĉe la nunaj provincoj Shaanxi, Shanxi, Shandong, Hebei kaj Henan.

Wei-regno situis ĉe la nunaj provincoj Shaanxi, Shanxi, Hebei, Shandong kaj Henan.

Qin-regno situis ĉe la nunaj provincoj Gansu, Shaanxi kaj Henan.

Ilustritaj de **REN MENGXIONG**

ĈINAJ PROVINCOJ MENCITAJ EN LA KLARIGOJ



- | | |
|-------------|--------------|
| 1. Shandong | 8. Shaanxi |
| 2. Hebei | 9. Henan |
| 3. Sichuan | 10. Jiangsu |
| 4. Hubei | 11. Liaoning |
| 5. Hunan | 12. Shanxi |
| 6. Jiangxi | 13. Gansu |
| 7. Anhui | |



Lamaisma templo Yonghegong en Pekino

de XIANG HUAN



LA templo situas en la nord-orienta parto de Pekino. En Ming-dinastio (1368 — 1644) ĝi servis kiel la oficejo de eŭnukoj, kaj poste en Qing-dinastio (1644-1911) oni faris ĝin loĝdomo de la princo Yinzen (poste la imperiestro Yongzheng). En la tria jaro post sia surtroniĝo (en 1725) la imperiestro Yongzheng nomis la domon Yonghegong-palaco, ĉar li uzis ĝin kiel sian provizoran palacon.

Yongzheng estis intrigema despoto. Eĉ nun en Ĉinio ankoraŭ cirkulas rakontoj pri lia kruela murdo de siaj fratoj por uzurpo de la

trono. Lia murdorimedo estis sensacia. Li metigis la dismembrigitajn kadavrojn de murditoj en vazon por solvi ilin per kemia likvaĵo kaj poste verŝis ilin en kloakon. Li havis aron da spionoj kaj murdistoj kaj la palaco efektive servis kiel lia spiona institucio, tial oni rigardis ĝin timiga kaj mistera.

En 1735 imperiestro Yongzheng mortis en Yuanmingyuan-ĝardeno en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. En aŭtuno de tiu jaro lia ĉerko estis metita en Yonghegong-palaco. Ekde tiam Yongyou-halo en la palaco, kie oni kultis lian portreton,

Portalo antaŭ la templo Yonghegong



*La granda statuo de la budho
Majtrejo en la halo Wanfuge.*

alinomiĝis Shenyu-halo, kaj tiel la palaco fariĝis templo de la kortego. En 1744 oni faris ĝin lamaisma templo. Lamaismo estas unu el la budhismaj sektoj en Ĉinio. Yonghegong estas la plej granda lamaisma templo en Pekino, kies lamaoj apartenas al la flava sekto.

La konstruaĵoj de la templo en oblonga formo estas grandiozaj. La templo okupas vastan areon kaj konsistas ĉefe el kvin kortoj, kies ĉefaj haloj staras unu post alia sur unu aksa linio suda-norda. La unua korto havas du pordojn orientan kaj okcidentan en simetrio. Fronte al ĝi estas ekranmuro kaj interne de la pordoj staras po unu portalo. Norde de la ekranmuro estas la

ĉefportalo, tra kiu la vojo kondukas al la aliaj kortoj. Post la pordo Zhaotai troviĝas la dua korto, kiu havas du kvadratajn kaj du okangulajn kioskojn kun steleoj ene. Enirinte Yonghe-pordon, oni venas al la halo "Ĉielaj Reĝoj", kie konserviĝas granda statuo de la budho Majtrejo. Ambaŭflanke de ĝi staras la statuoj de kvar Ĉielaj Reĝoj. Yonghe-halo en la tria korto estas la ĉefa halo en la templo. En ĝia mezo estas altaro, sur kiu sidas la budhoj de la tri generacioj pasinta, nuna kaj estonta. Ĉe la dekstra kaj maldekstra flankoj de la halo estas 18 arahatoj, t.e. disĉiploj de Ŝakjamunio (alinome Gotamo). Oriente kaj okcidente de la halo sin lokas akcesoraj haloj interligitaj per koridoroj. Meze de la korto staras kvadrata kiosko kun steleo ene.

Post Yongyou-halo estas la kvara korto, kies halo havas preskaŭ la saman grandecon kiel la halo "Ĉielaj Reĝoj". La ĉefa halo de la korto nomiĝas Falun kaj enhavas bronzan statuon de Conkapa, la fondinto de la flava sekto de lamaismo. La statuo altas pli ol ses metrojn. Malantaŭ ĝi estas la "Monto de 500 Arahatoj"—arta monto el santala ligno, sur kiu staras statuetoj el oro, arĝento, kupro, fero kaj stano. Ĝi estas tre valora budhisma artaĵo. Sur la originala tegmento de la halo staras kvin malgrandaj pavilonoj, sur kiuj estas po unu lamaisma tureto. Tio montras la artan stilon de lamaismo. Ambaŭflanke de la halo sin trovas po unu pavilono situanta sur la sama linio kun la halo Falun. En tiu halo konserviĝas 108 volumoj de antikvaj sutroj ĉe la okcidenta murpiedo, kaj 207 aldonaj volumoj ĉe la orienta murpiedo. Ili ĉiuj estas en la tibeta lingvo. Du muroj de la halo estas kovritaj de grandaj freskoj, kiuj priskribas la vivon de Ŝakjamunio kaj lian predikadon.

La ĉefa konstruaĵo en la kvina korto nomiĝas Wanfuge. Ĉi tiu trietaĝa kvadrata halo okupas sufiĉe

grandan areon. Ĝi estas la plej alta el ĉiuj haloj de la templo, kaj en ĝi staras la kolosa statuo de la budho Majtrejo gravurita el unu santala trunko kun diametro de tri metroj. Ĝi estas 26 metrojn alta, inkluzive de ok metroj sub la tero. Laŭ historiaj notoj, en 1750 la sepa Dalailamao de Tibeto transportigis al Pekino la santalan trunkon kiel sian donacon al la imperiestro Qianlong. La kapo de la statuo preskaŭ tuŝas la plafonon, tiel ke nur en la koridoro de la tria etaĝo oni povas bone rigardi ĝian vizaĝon. Ambaŭflanke de la halo troviĝas la pavilonoj Yongkang kaj Yanning, kiuj interligiĝas kun la halo per ponta koridoro.

Laŭdire, en la fruaj jaroj, la tegmentoj de ĉiuj konstruaĵoj de la templo estis kovritaj per verde glazuritaj tegoloj, sed post la surtroniĝo de la imperiestro Yongzheng ili estis anstataŭigitaj per flave glazuritaj. En Ĉinio nur ĉi tiu templo portas tian koloron.

Rilate al la aranĝo de la templa konstruaĵaro, la antaŭa duono impresas vizitantojn per vasteco. Tie la ekranmuro, kioskoj kaj aliaj konstruaĵoj estas akompanataj de pinoj kaj cipresoj. De la pordo Zhaotai komenciĝas la posta duono, kiu per dense lokitaj haloj, pavilonoj kaj aliaj konstruaĵoj draste kontrastas kun la antaŭa duono.

En la pasinteco, ĉiujare je la 30-a de la unua monato laŭ la luna kalendaro okazis en la templo religia ceremonio por "Forpeli diablojn", kio efektive estis danco de lamaoj, kiuj maskovestis sin en ĉielajn diojn por forpeli demonojn kaj diablojn. La lamaoj kun armiloj, flagoj kaj muzikaj instrumentoj en la manoj iradis en procesio ĉirkaŭ la templo, ludante muzikilojn kaj recitante sutron. Ĉiufoje, kiam okazis la aktivado, granda nombro da urbanoj de Pekino svarmis tien por rigardi. En Qing-dinastio la imperiestroj eĉ sendis sian ministron ĉeesti ĝin, kio montris la imponecon kaj majesteccon de la ceremonio.



EKSPOZICIO DE ITALAJ FOTOJ EN PEKINO

En la mezo de marto, la ekspozicio havis lokon en la Ĉina Belarta Domo, Pekino. La ekspoziciataj pli ol 140 fotoj de pli ol 100 fotistoj vivece spegulas longan kulturen historion de Italio, la enhavoriĉan vivon de ĝia popolo kaj ĝiajn belajn naturajn pejzaĝojn.

La verkoj kun variaj temoj, malsamaj stiloj kaj alta tekniko tre interesis ĉinajn fotografistojn kaj amatorojn.

ĈINOJ RIGARDIS MAJSTROVERKOJN KOLEKTITAJN DE D-RO ARMAND HAMMER

De marto ĝis majo, en la Ĉina Belarta Domo, Pekino, okazis ekspozicio de majstroverkoj de famaj pentristoj en la pasintaj 500 jaroj, kolektitaj de d-ro Armand Hammer. Ĝi altiris al si multe da ĉinaj spektantoj. La fama pentraĵo-kolektisto Armand Hammer estas prezidanto de la direkcio de la Okcidenta Petrola Korporacio de Usono.

La pli ol 100 pentraĵoj kolektitaj de li plejparte estas verkoj de famaj majstropentristoj Rembrandt, Renoir, Rubens kaj Goya depost la eŭropa renesanco kaj olepentaĵoj de modernaj francaj pentristoj Corot kaj aliaj.

GOETHE KAJ ĈINIO

La 22-a de marto ĉi-jare estis la 150-a datreveno de la forpaso de la granda germana poeto J. W. von Goethe. Por rememorigi pri li ni speciale publikigas jenan artikolon.

La Red.



J. W. Goethe (1749-1832)


J. W. von Goethe, kiu estas honorita kiel unu el la farantoj de la "granda epoko de la germana literaturo", ĝuas altan prestiĝon inter la vasta ĉina legantaro. Li estas ne nur la plej estimata granda poeto en Germanio, sed ankaŭ majstro de dramaturgio, literatura teorio, filozofio, pentrado, natura scienco k.a. Lia penso iel influis la pensliberigan movadon en la ĉina demokratia revolucio, kaj lia arto nutris la ĉinan modernan literaturon. La antaŭirantoj de la ĉina moderna literaturo, ekz. la elstara verkisto kaj poeto Guo Moruo, la dramisto Tian Han kaj aliaj ricevis spiritan kaj artan nutraĵon el liaj verkoj. Ĝuste kiel Guo Moruo mem diris, Goethe por li estas unu el la plej influhavaj eksterlandaj poetoj. En la poemaro de Guo Moruo "Diino", evidente

videblas la stilo de Goethe. La frutempa verko de Goethe "La Suferoj de Juna Werther" antaŭlonge vekis atenton de la ĉinaj progresemaj intelektuloj kaj estis ĉinigitaj iuj ĝiaj fragmentoj. Lia kontraŭfeŭdisma spirito sendube estis kuraĝiga por la plej frua ĉina demokratia movado. En 1922, la dua jaro post la apero de "Diino", Guo Moruo tradukis kaj publikigis la tutan romanon "La Suferoj de Juna Werther", kiu tre harmoniis kun la spirito de la kontraŭfeŭdisma "Movado de la 4-a de Majo" kaj tiel vekis fortan eĥon ĉe la ĉinaj legantoj. Post tio Guo Moruo ankaŭ ĉinigis kaj eldonis la romanon "Faŭsto", kristaliĝo de la verkista vivo de Goethe. Tiu fama verko estas ne nur artaĵo, sed ankaŭ trezorejo de scioj kaj saĝo. Ĝi estas alloga por la vastaj ĉinaj verkistaro kaj legantaro.

Goethe havis apartan intereson pri Ĉinio. Li fervore zorgis pri la ĉina literaturo kaj filozofio, precipe en siaj lastaj jaroj li legis germanan, francan kaj anglan versiojn de ĉinaj noveloj, dramoj kaj poemoj. Li laŭdis, ke iuj el la ĉinaj teatraĵoj de Yuan-dinastio (1279-1368) estas tre profundaj kaj emociaj en prikskribo de la personaj sentemoj. Li estis kortuŝita de la brava sinofero de la heroo de la dramo "Orfo Zhao" kaj intencis surscenigi ĝin en Germanio. Li admiris ankaŭ la novelojn "Amhistoriaj Rakontoj",

"Strangaj Aferoj Pasintaj kaj Nunaj" kaj iujn lokajn dramojn, kaj volis adapti iun el ili al longa poemo. Kvankam li sciis, ke ili, neniel estas inter la plej eminentaj verkoj de Ĉinio, tamen el ili li konis la brilan kulturon kaj moron de Ĉinio kaj naskiĝis pro tio lia simpatio al Ĉinio. En la verkoj de liaj lastaj jaroj plurfoje aperis personoj kaj rekvizitoj rilataj kun Ĉinio.

J. W. von Goethe opiniis: "La ĉinoj estas tre similaj al la germanoj." Li diris: ". . . la ĉinoj estas preskaŭ la samaj kiel ni en la ideologio, konduto kaj sento, ke ni tre rapide ekkonsciis, ke ili kaj ni apartenas al la sama kategorio". Li ankaŭ opiniis, ke la ĉinaj poetoj strikte observas moralajn normojn kaj estas moderaj en ĉio, kaj ĝuste tio ebligis la kelkmiljaran ekziston de Ĉinio kaj ebligis ĝian pluekziston en la estonteco. Lia rimarko estis ĝusta. Prave diris la granda ĉina verkisto Lusin, ke li estas granda poeto kun vasta vidkampo kaj riĉa imagipovo. Nelonge antaŭ sia morto Goethe verkis 14 sentimentalajn poemojn kun la titolo "Ĉinaj-germanaj Sezojoj kaj Horoj", laŭ la enhavoj de iuj ĉinaj literaturaĵoj. Dum tiu periodo la ĉirkaŭ 80-jara maljunulo ankoraŭ ne malstreĉis sian studadon pri la ĉina kulturo. Li skribis en sia taglibro, ke vespere li legis ĉinajn dramojn.



Bakin ricevis “Internacian Premion Dante Alighieri”

BAKIN, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de la Universala Esperanto-Asocio, ricevis la Internacian Premion Dante Alighieri por 1982. La ceremonio por la premiado okazis en la itala urbo Florenco la 2-an de aprilo. La premia medalo portas sur sia fronto reliefan figuron de Dante kaj la nomon de Bakin sur la dorso.

La Internacia Premio Dante Alighieri estis starigita de la Itala Akademio en la jaro 1979 por rememorigi pri la granda poeto Dante. La premiado okazas unufoje jare kaj la honoro estas donita ĉefe al literaturistoj kaj kleruloj, kiuj ĝuas internacian prestiĝon. Bakin estas la kvara premiito. La organizanto de la premio diris en la ceremonio, ke oni donis la premion al Bakin, ĉar li per siaj verkoj esprimis sian

komprenon kaj admiron al Dante.

En sia verkista vivo de pli-ol-duon-jarcento la 78-jara Bakin kreis multajn verkojn, kiel romanoj “Familio”, “Printempo”, “Aŭtuno” kaj “Rememoroj” kaj ankaŭ noveloj kaj esoj, el kiuj nemalmultaj estis jam tradukitaj en plurajn lingvojn kaj ricevis laŭdojn de eksterlandaj legantoj. Nun li verkas du novajn romanojn.

La loĝejo de J. W. von Goethe en Frankfurto ĉe Majno estas vizitata de 150 000 personoj el diversaj partoj de la mondo ĉiujare. Ĝia ĉefa salono sur la dua etaĝo, nomata “La Pekina Salono”, estas meblita laŭ la ĉina stilo kun ĉin-stilaj pentraĵoj surmure, kaj ĉina tradicia trinkilaro ene. Eĉ la tabloj kaj seĝoj en la ĉambro estis faritaj laŭ la ĉinaj. En la muzik-ĉambro sur la sama etaĝo kuŝas malnova orgeno produktita ankaŭ laŭ la stilo de ĉina meblo, kies kovrilon oni ornamis per tipe ĉinaj lak-pentraĵoj de monto, rivero, arboj, ĉasado, fiŝkaptado kaj pagodo. Ĉio ĉi spegulas lian amon al la ĉina kulturo.

KUNVENO POR REMEMORIGI PRI GOETHE EN PEKINO

La ĉinaj kulturaj rondoj solene kunvenis la 20-an de marto en Pekino por rememorigi pri la granda germana poeto J. W. von Goethe (1749-1832) okaze de la 150-a datreveno de lia forpaso.

La prezidanto de la Ĉina Literatura kaj Arta Federacio Zhou Yang ĉeestis la kunve-

non, la vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj estro de la Instituto pri Fremdlanda Literaturo Feng Zhi faris longan paroladon pri la vivo de J. W. von Goethe kun la titolo “Pli da Lumo”. En la kunveno famaj aktoroj kaj kantistoj de Pekino deklamis Poemojn de J. W. von Goethe.



George Enescu

CEZAR APREOTESEI:

George Enescu

— MIKEL-ANĜELO DE LA RUMANA MUZIKO

En la pasinta jaro celebriĝis mondscale la centa datreveno de la naskiĝo de la rumana eminenta muzikisto George Enescu, laŭ la kalendaro pri grandaj kulturaj datrevenoj de UNESKO. Rumana samideano Cezar Apreotesei verkis, tiuokaze, artikolon pri la geniulo por "El Popola Ĉinio". Sed bedaŭrinde, lia kontribuajo ial atingis nin tro malfrue por aperi en iu numero de 1981 kaj ni povas ĝin prezenti al niaj legantoj nur nun kun ioma mallongigo.

— La Red.

La genia rumana muzikisto George Enescu (1881-1955) estis renesanctipa kreinto, kvazaŭ erare vivinta en la jarcento de la atomo kaj la kosmokonkero. Ĉi tiu "Mikel-Anĝelo de la rumana muziko" realigis, per sia verko altgrade humanisma, aŭtentan sintezon de la nacia kaj la universala, de la popola muziko kaj la eŭropaj skoloj, de la orienta kaj la okcidenta.

Titano de la moderna muziko, fondinto de komponista kaj ludista skolo, Enescu kontribuis, kiel al la universaligo de la rumana muziko, tiel ankaŭ al la procezo de la estiĝo de la nova

aspekto de la universala muziko. Ĉiam pli granda nombro da kritikistoj konsideras lin kiel aŭdaca mondan antaŭulon de la epoko, kreanton kiu novigis kaj revoluciigis la muzikon de la dudeka jarcento.

Naskiĝinta 19. aŭgusto 1881 en la vilaĝo Liveni, nun portanta lian nomon, en la distrikto Bosani, Enescu estis la dekdua infano de sia familio, sed la unika supervivinta la infanaĝon. Lia naskiĝloko situas en la norda Moldavio, en efektiva "nesto de genioj".

George Enescu estas konsiderita mirinfano kaj en sia 4-5-jara

aĝo, li estis lerninta ludi violonon kaj pianon, kaj estis komencinta la komponaĵon "Rumana tero". Je la aĝo de 7 jaroj, oni enskribis lin en la Konservatorion de Vieno, kie li estis nomitaj poste la rumana Mozarto. Lia unua violonista triumfo okazis ĉe la imperiestra kortego, antaŭ "ravita aŭskultantaro", honorita ankaŭ per la ĉesto de la imperiestro Franz Josef. Je la aĝo de 15 jaroj, liaj verkoj "sonato" kaj "Tarantelo" por violono kaj piano estis prezentitaj unuafoje en Parizo. Post unu jaro, li havis reeĥan sukceson ĉe la publiko kaj gazetaro per sia

“Rumana Poemo” (1897), kiun sekvis du “Rumanaj rapsodioj” (1901, 1902), signintaj la vojon al la tutmonda diskonigo de la brila muzikisto.

Post la fino de la studoj en Parizo kun la plej altaj aprezoj, li estis konsiderata kiel unu el la elstaraj junaj muzikistoj de Eŭropo. Komponisto imponinta en la simfonia ĝenro, virtuoza violonisto kaj pianisto, naturdotita per mirinda memoro (li posedis en sia repertuaro preskaŭ ĉiujn klasikajn koncertojn kaj estis kapabla plenumi ilin en ĉiujn ajn momento), George Enescu komencis esti vokata, kiel ludisto kaj orkestro-direktisto, al la grandaj urboj de la eŭropa kontinento: Berlino, Londono, Frankfurto, Romo, Amsterdamo, Peterburgo, Budapeŝto, Zuriko, ankaŭ al Bukareŝto kaj al multnombraj urbetoj de sia patrolando, dum liaj komponaĵoj jam transpasis la Atlantikan oceanon (ili estis ludataj en Novjorko, Bostono ktp). En leteroj kaj aŭtobiografiaj atestoj de tiu epoko, George Enescu — la muzikisto, humanisma spirito kun alta morala sinteno kaj vasta horizonto — enkalkulas sin kiel apartenanto al la kulturoj germana (viena) kaj franca, laŭ siaj muzikaj studoj, al la rumana popolo, laŭ sia origino, kaj al la tuta mondo, kiel profesia artisto.

Post jaroj, okaze de sia akceptado en la Rumanan Akademion, li deklaris: “La muziko. . . lingvaĵo el la koro fontanta kaj destinata alporti amon kaj interfratiĝon inter tiuj dividitaj de apartaj kredoj kaj moroj. La muziko estas lingvaĵo kiu respegulas, sen ia ajn ebleco de hipokriteco, la psikajn ecojn de la homo, de la popoloj.”

En la koncepto de Enescu, la muziko estas destinata “estingi la malamojn, mildigi la pasiojn kaj alproksimigi la korojn en varman interfratiĝon, kiel ĝin komprenis la antikva epoko, kreinta la miton pri Orfeo”.

Unuaranga personeco de la rumana kulturo, George Enescu “parolis” pere de la universala muzika lingvaĵo al ĉiuj homoj, indiferece al iliaj naciecoj. Fontinta el la profunda grundo de la rumana spirito, el la prapatra folkloro kaj el la bizanca fonto de romia substanco, lia verko altiĝis al la plej superaj esencoj, tiuj de universala kreaĵo. Li demonstris, ke la certega vojo al la universaleco pasas tra la valorigo de la provizoj de sialanda melodiaro. Kiel gvidmelodio ofte aperas en liaj konfesoj la vortoj de alta aprezo pri la rumana folkloro. La popola muziko profunde enradikiĝis en la animon de la rumanoj. En “La Revue musicale” (1931), la granda muzikisto alte pritaksis la rumanan popolan muzikon. “Per la muziko,” diris G. Enescu en la parolo okaze de sia akceptado en la Rumanan Akademion, “la milda kaj revema animo de la rumano fariĝis konata al la mondo, igante la alilandanojn eksklamacii: popolo kantanta tiel kortuŝe la dojnnon (elegia popolkanto) estas nobla kaj bonkora!”

Sentema kaj lirika, romantika kun klasikaj aspiroj, humanisto kaj patrioto, G. Enescu dediĉis la propran verkon al sia popolo kaj al la homaro. “Mi servis mian landon nur per mia animo,” diris li iam. “Ĉion, kio restis al mi kiel forto kaj energio, mi dediĉas al miaj muzikaj kreaĵoj, per kiuj mi komprenas servi nian rumanan genton,”

konfesis li proksime de sia vivofino, en letero al la prezidinto de la Granda Nacia Asembleo, d-ro Petru Groza.


Dum la Unua Mondmilito li sindoneme dediĉis sian tutan artistan agadon al la bonfaroj, koncertante por la vunditoj, por kolektado de fonduso helpe al la rifuĝintoj, al la gefiloj de la invadita patrolando. Lia kreaĵo estas destinata al sia popolo, tamen ĝi penetris ĝis la plej malproksimaj anguloj de la tero kaj estas vaste aprezata sur ĉiuj meridianoj.

Novaj atestoj kaj dokumentoj, malkovritaj dum la lasta jarcentkvarono, precipe post la estiĝo de la Internacia Festivalo “George Enescu” (1958), okazanta ĉiun trian jaron, la malkovro de 130 komponaĵoj ankoraŭ ne eldonitaj fundamentis novan branĉon de la rumana muzikscienco — la eneskologion; per ĝi oni malkaŝas novajn kreivajn dimensiojn de la granda muzikisto. Li aperis ankaŭ kiel plurmuzikilisto (krom la violono kaj piano, li ludadis ankaŭ orgenon, kornon, fluton, violonĉelon), li estis talenta figurartisto (desegnisto, karikaturo, pentristo), poeto. . .

Enkadre de la naciaj kaj internaciaj omaĝaj aranĝoj, dediĉitaj al la datreveno de cent jaroj post la naskiĝo de George Enescu, en Rumanio oni aranĝis la IX-an eldonon de la Internacia Festivalo de Enescu (16-26 sept. 1981), — nova okazo emfazi la valoron de la verkaro de la granda muzikisto, la profundan patriotan kaj humanisman mesaĝon de la eneska kreaĵaro. Dum dek tagoj okazis 41 koncertoj simfoniaj kaj ĉambraj, recitaloj,

opero- kaj baletospektakloj, prezentitaj de orkestraj, voĉaj, dancaj ensembloj, de muzikludilaj formacioj, de kantistoj kaj ludistoj en- kaj eksterlandaj. Tio estis granda festo de la muziko, dum kiu brilis la eneskaj komponaĵoj kaj aliaj valoraj rumanaĵoj, dum kiu oni aprezis mejloŝtonajn paĝojn el la monda muzikverkaro, oni aplaudis prestiĝajn en- kaj eksterlandajn kantistojn kaj ludistojn. Pli ol 40 komunikadoj dum la Muzikologia Simpozio — la plimulto prezentita de mondfamaj komponistoj, muzikologoj, muzikkritikistoj — originale kontribuis en la klarigo de la plurfacetaj eneskaj stilistiko kaj estetiko, en la pliigo de la traktado pri la verkaro de unu el la plej grandaj komponistoj de nia jarcento. El la multnombraj impresoj, pensoj kaj opinioj esprimitaj de la partoprenintoj en la Festivalo, ni reprenas ĉi-suben la vortojn de la pianludisto Li Minqiang, profesoro en la Shanghai-a Konservatorio (Ĉinio), kiu koncertis en Bukareŝto kaj Timisoara: “Por mi, George Enescu estas ne nur granda rumana komponisto, sed ankaŭ modelo de multflanka personeco, de altkultura homo. . .”

La vivo plene konfirmis la antaŭvidon de la fondinto de la moderna romano en la rumana literaturo, Liviu Rebreanu, skribinta antaŭ duono da jarcento, okaze de la duonjarcenta datreveno de la brila muzikisto: “George Enescu reprezentas antaŭ la mondo la rumanan animon, kun ĉio, kion ĝi havas pli pura kaj pli nobla. Ne eblas, ke centoj da miloj da homoj sur la tera surfaco, kiuj amas Enescu, ne brakumu per la sama amo ankaŭ la popolon kaj la landon donacintajn lin al la mondo.”



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 respo. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPĈ povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

* Gelernantoj el Jugoslavio deziras korespondi tutmonde pri sporto, turismo, kanto kaj bildkarto. Iliaj adresoj estas:

— Brkic Hajrudin, 13j. lernanto, El. Ler. Arnauti, JU 72000, Zenica;

— Kolic Kasim, 14j. lernanto, El. Ler. “Omer Maslic” Arnauti, JU 72000, Zenica;

— Brkic Zijada, 13j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Ar-

nauti, JU 72000 Zenica;

— Karic Senija, 14j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Arnauti, JU 72000 Zenica;

— Arnaut Salko, 13j. lernanto, El. Ler. Omer Maslic Arnauti, JU 72000 Zenica;

— Jašarevic Hidajeta, 12j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Babino, 72000 Zenica;

— Mahmic Sedina, 12j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Babino, 72000 Zenica;

— Hamzic Midheta, 12j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Babino, JU 72000 Zenico;

— Mahmic Hata, 12j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Babino, JU 72000 Zenica;

— Karaman Vidosava, 15j. lernantino, El. Ler. Omer Maslic Babino JU72000 Zenica.

* Magdalena Zukowska, ul. Tagore 1m 14, 93-503 Lodz, Pollando, vol. kor. kaj sendi multe da polaj poŝtmarkoj.

Dezirontoj! Belaj poŝtmarkoj haveblas facile!

MAGIA HERBO

(Humuraĵo de la antikva Ĉinio)

Ilustrita de YIN FENGGE



En la pasinteco, iu donacis al Asan herbon, dirante ke kun ĝi oni estos nevidebla. Asan, ekster si de ĝojo, iris al bazaro kun la herbo.

Kiom ajn poŝtmarkon vi deziras, sendu rapide internaciajn respondkuponojn. Unu i.r.k. havigos sume 100 (cent) malagasajn frankojn de novaj poŝtmarkoj de la R. D.M. (Malagasa Demokratia Respubliko).

Atentu: Bonvolu aldoni unu plian i.r.k. por afranko! Rakotondraĵo, Antanambao-Aniezika IVL 309, Antananarivo, (Madagascar).

* Janusz Motykiewicz, 38j. oficisto, dez. kor. tutmonde precipe pri muziko moderna, lumbildoj, turismo, Esp. movado ktp., Kozie Doly 46, 67-240 Kotla, Pollando.

* S-ino Sharon Gordon, 929 Old Hollow Road, Winston-Salem, NC 27105 Usono, (25j.) dez. kor. tutmonde. Hobioj: stampoj, receptoj, fotografio, sciencfikcio, psikologio, stebado, ĝardenarto, komputero, biciklado kaj matematiko.

Somerumado apud la adriatika marbordo

En belega parto de la adriatika marbordo, inter Split (17) kaj Omiš (6) km. sur la magistralo, kaj cent m. de la Maro vi povas somerumadi en esperantista rondo. En ĵus finita domo, mi luigas ĉambrojn kun kuirejo (laŭ inter-

konsento), kaj ĉiuj interesuloj estas petataj skribi antaŭe, al la adreso: Davor Grgat, Paiĉeva 21-58000 Split, Jugoslavio, aŭ al tel: 058/512-565.

* Scarpa Fulvio, Versace 3 Tr. 24. 89100 Reggio Calabria, Italio, dez. kor. kun la tuta mondo.

* Bara Esperanto-klubo, simiolo Eboli Giuseppe, A.N.S.I-Sottufficiali, Via San Francesco, D'Assisi n-ro 6 Bari, Italio, dez. kor. kun la tuta mondo.

* S-ino Rita Dietrich, Selzergasse 5, D-3420 Herzberg, FR Germanio, 24-jara infanartistino serĉas leteramik(in)ojn el Ĉinio kaj t.n. pri la temoj: literaturo, ĵogomuziko, parapsikologio, ktp.

* S-ro Emil Mundil, Marktstrato 41, D-3423 Bad Sachsa, FR Germanio, 78-jara rentulo serĉas leteramikojn el Ĉinio.

* S-ino Ingeburg Dietzmann, Am Galgenkamp 2, D-3370 Seesen, FR Germanio, emerita studkonsilistino 75-jara serĉas korespondamikojn pri biologie dinamika hortikulturo kaj pri lingvoj, ktp.

* S-ino Gerti Roger-Kukas, Blumenberg 16, D-3423 Bad Sachsa, FR Germanio, 41-jara dommastroino serĉas leteramikojn pri fungoj

kaj aliaj temoj kun E-amikoj el Ĉinio kaj t.m.

* S-ro Rainer Beikirch, Bhanhofstr. 10, D-3425 Walkenried, FR Germanio 33-jara malsanulflegisto serĉas korespondantojn pri fotografio kaj ĉiutagaj temoj.

* 25-jara fabrika laboristo kiu ĉijare finis ekonomian mezlernejon. Deziras korespondi kun ĉina kamarad(in)o pri ĉiuj temoj. Li dez. interŝ. p.b. kaj p.m. Skribu al la adreso: Kormoczy Antal, Solunska ul. 18. 24420 Kanjiza, Jugoslavio.

* Lernantino 14-jara deziras korespondi kun laŭeble samaĝa lernantino, kiu loĝas en Ĉinio. Skribu al la adreso: Farkas Livia, Latak Istvan 25, 24420 Kanjiza, Jugoslavio.

* Ŝi estas 18-jara lernantino, kiu deziras korespondi kun japana lernantino same 18-jara pri temoj, kiuj interesas la junularon. La adreso: Kovacs Zsuzsanna, Oktobarska ul. 19. 24420 Kanjiza, Jugoslavio.

* 11-jara lernanto deziras korespondanton de 10 ĝis 20-jaran. Jen la adreso: Huszar Csaba, Vojvode Putnika 8. 24420 Kanjiza, Jugoslavio.



Ĝenis al li viro kun moneroj en la mano.



Asan alpaŝis kaj forrabis la monerojn.



La prirabito kaptis Asan, lin forte batis kaj insultis. Asan tamen diris: "Batu laŭ via plaĉo! Sed vi neniel povas min vidi."

KOLORAJ INFANLIBROJ

NEĜA INFANO




Bildrakonto pri neĝa infano, kiu ne timas fajron.
Li brave savis kunikleton el fajro kaj sin oferis.

Kompilita kaj pentrita de Liu Si

Eldonita de "El Popola Ĉinio"

Numero: 88-Es-179P

Formato: 18×20,5cm. 40 paĝoj Prezo: £0,65 US\$1,30



Simioj Provas

Elakvigi la Lunon

Ĉu simioj estas saĝaj aŭ malsaĝaj? Legu ĉi tiun infanlibron, kiu enhavas du rakontetojn pri petolaj simioj.


Teksto de Xia Xia Bildoj de Wan Laiming

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo


Tria eldono (retradukita)

Numero: 88-Es-61P


Formato: 21×26cm. 16 paĝoj Prezo: £0,50 US\$0,95



Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Peranto de EPC
aŭ **Esperanta Sekcio de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN),**
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



La statuo de Congkapa — la fondinto de la flava sekto de lamaismo



La Turo de Sonorilo

La Templo Yonghegong



Fotoj de HUO JIANYING

Tri budhostatuoj el santalo en la ĉefa halo



La Antikva Urbo Luoyang


Fotoj de ZHOU QINJUN



La Luoyang-a Muzeo nove konstruita



Guanlin, unu el la antikvaj konstruaĵoj en Luoyang



La peonioj de Luoyang estas famaj tra la lando pro siaj beleco kaj multeco de specoj.

Budhostatuo en la templo Baima



La Longmen-a Ŝtonkavernaro apud la rivero Yishui



